

Abonu la novan Heroldon kaj pripensu la mondon kune kun ni

Vi havas en la manoj la unuan numeron de la jarolekto 2017, sed kun nur 12-paĝoj. La originala plano estas eldoni 20-paĝan gazeton kaj tiel ni faros. La dua numero havos 16-paĝojn kaj ekde la tria Heroldo estos 20-paĝa gazeto.

Novaj legantoj, abonantoj kaj kunlaborantoj estas tre bonvenaj. En la sekvaj numeroj Heroldo estos multe pri diversa kaj riĉenhava.

Heroldo por neesperantistoj

En ĉiu numero estos paĝo en iu nacia lingvo, kun reklamo aŭ informaj artikoloj. Ĉi-numere vi legos reklamon en la portugala. Pli ol 1500 ekzempleroj de Heroldo estos disdonitaj al neesperantistoj en Brazilo.

Temas pri nova maniero diskonigi iniciatojn ligitajn al Esperanto. Estonte aperos reklamoj kaj artikoloj en la angla, hispana, japana, germana, franca rusa, hinda, svahila ktp.

Ĉio okazos surbaze de partneriĝo inter Sociala Grupo Lexus, la nova eldonejo de Heroldo de Esperanto, kaj landaj, lokaj aŭ fakaj asocioj.



Diversaj formoj aboni Heroldon

1 En nia reta abonilo ĉe www.heroldodeesperanto.com/abonilo vi trovos ĉiujn abontipojn;

2 Per pago per Transferwise*, nur por:

■ abono de la papera versio (12 numeroj) + reta versio (12 monatoj), ĉe <http://bit.ly/AbonoHdE59-Transferwise>

■ du-jara abono de la reta versio (24 monatoj), ĉe <http://bit.ly/AbonoHdE-reta58-Transferwise>

Sufiĉas pagi per unu el la supraj ligiloj kaj poste sendi al abono@heroldodeesperanto.com viajn personajn informojn.

* Servo disponebla nur por Eŭropo, Britio, Usono, Aŭstralio, Hungario, Barato, Pollando, Svisio, Sudafriko, Koreio, Ĉilio, Svedio, Danio, Novergio, Ganao, Japanio, Ĉeĥio, Bulgario, Meksikio, Kroatio, NovZelando, Rumanio, Kolombio, Malazio, Rusio, Pakistano, Ĉinio, Tajlando, Ukrainio, Turkio, Vjetnamio.

3 Per la formularo (nur por **brazilanoj**) ĉe <http://bit.ly/assinar-Heroldo>

Aboni Heroldon estas ankaŭ apogo al la diskonigo de Esperanto!



Kaj nun ĝuu la unuan numeron de la jarolekto 2017



Heroldo

96
jaroj
Fondita en 1920

de Esperanto **Ni pripensas la mondon**

ISSN 0018-0823

www.heroldodeesperanto.com

N-ro 1 (2268) — 93-a Jarkolekto

Fondita de Teo Jung en Kolonjo (Germanio)

Eldonata en Trindado - GO (Brazilo)

€5,00
R\$16,00

Via Heroldo renoviĝas sojle de sia 100-jariĝo

AVANGARDE Tute renovigita 96 jarojn post sia fondo fare de Teo Jung, Heroldo de Esperanto disvolvos novan koncepton rilate E-gazeton. Ĝi pritraktos ne nur Esperanton kaj ĉiu numero havos unu paĝon direktatan al neesperantistoj en iu nacia lingvo. Malnovaj legantoj de Heroldo surpriziĝos pro la radikalaj ŝanĝoj grafikaj kaj enhavaj. Kial ne ŝanĝiĝi, se la mondo ŝanĝiĝis? **Paĝoj 6 kaj 7**



“Ni pripensas la mondon” estas la devizo de Heroldo ekde nun.



Navigi necesas

Fernando Pessoa

*Antikvaj navigistoj havis gloran frazon:
“Navigi necesas; vivi ne necesas.”*

*Mi volas por mi la spiriton de tiu ĉi frazo,
forme transformita por akordiĝo kun mia esto:*

*Vivi ne necesas; necesas ja krei.
Mian vivon mi ne intencas ĝui; mi eĉ ne emas ĝin ĝui.
Mi volas nur igi ĝin granda,
eĉ se tiucele mia korpo kaj (mia animo) nepre estos la
brulligno de tiu fajro.*

*Mi volas nur igi ĝin tuthomara;
eĉ se tiucele mi nepre ĝin perdos kiel mian.
Pli kaj pli mi tiel pensas*

*Pli kaj pli mi servas per la anima esenco de mia sango
la nepersonan celon grandigi la patrujon kaj kontribui
al la evoluo de la homaro.*

*Jen la formo, kiun ĉe mi alprenis la mistikismo
de nia Raso.*

Spegulo, la kajero pri arto kaj kulturo de Heroldo de Esperanto povos roli brile sur la scenejo nur se niaj plej grandaj talentoj kunlaboros per siaj verkaĵoj. Ĉi-numere Paulo Silas brile recenzis la du unuajn romanojn verkitajn en Esperanto kaj Fabrício Valle prezentas la kajeron al la legantoj. **Paĝoj 6 kaj 7**

ZAMENHOF-JARO

“Ne flagoj, sed agoj”

Jolanta van Holstein: Suriri la stratojn kun nia respektinda flago kaj devizo “Esperanto la lingvo de la paco” ne helpos. Tial mi diras: “Ne flagoj, sed agoj”. **Paĝo 2**

INTERVJUO

La intervjuoj de Heroldo okupos du paĝojn. Henri Masson estas nia ĉi-numera intervjuito. **Paĝoj 4 kaj 5**



ANKORAŬ EŬROPO

Carlo Minnaja artikumas pri la situacio en Eŭropo, lige al la 60-a datreveno de la subskribo de la Romaj Traktatoj. **Paĝo 3**

POR/PER ESPERANTO

Renato Corsetti verkas pri la agado por kaj per Esperanto. **Paĝo 11**

SCIENCA HEROLDO

La israela sciencisto Amri Wandel havas la mision raporti pri scienco, en kaj ekster Esperantujo **Paĝo 9**



Lingvio

La mondo de la lingvoj

Ĉi-numere, Giridhar Rao, intervjuita de Massimo Ripani, parolas pri la lingva situacio en Barato. **Paĝo 10**

ĈEFARTIKOLO

Ni pripensas la mondon

Fondita en 1920 de Teo Jung, en Germanio, Heroldo de Esperanto fariĝis nedisiĝebla parto de la historio de Esperanto. Tra tri malsamaj periodoj, tiu de la fondinto mem, de la posteulino Ada Fighiera-Sikorska kaj de la plej lasta, de LF-koop, Heroldo atingis la zeniton kaj poste la nadiron, sed ĝi ĉiam estis granda pasio de la esperantistaro.

Sed, ĉio fluas kaj la mondo multe ŝanĝiĝis en la lastaj jardekoj. Ni ne plu estas en la tempo de la poŝta korespondado, hobia tre aprezata ĝis la komenco de la interreta epoko. La novaĵoj pri la agado de la esperantistoj tra la tuta mondo ne plu vojaĝas sur papero de gazeto, sed tute fulmrapide per retmesaĝoj, per sociaj retoj kiel Facebook, blogoj, videoj en Youtube, skajpo kaj similaĵoj. Do, kiun rolon povas havi gazeto kiel Heroldo en tiu tute nova mondo? Ĉu esti vehiklo de novaĵoj, en monata aperitimo, konkurence kun la retaj komunikiloj? Ĉu la reta versio, se paroli pri nur prezento de novaĵoj, sufiĉas por la modernigo de HdE? Certe ne. Kio do?

Nun, sojle de sia centariĝo, ĉio ŝanĝiĝas en la vivo de Heroldo, pro la fakto, ke de nun brazila sociala entreprenado prenas la torĉon kaj ĝin eldonas, kun la granda celo igi ĝin denove amata, ŝatata kaj vaste legata de ĉiuj esperantistoj, en ĉiuj anguloj de nia Esperantujo. Ĝi nun ja havas la ŝancon reakiri la viglecon de la pioniraj tempoj. Aliflanke, la fakto, ke ĝi nun estas eldonata en Brazilo, kaj ne plu en Eŭropo, estas klara signo de la ekspansio de Esperanto tra la mondo kaj konfirmo, ke Eŭropo ne estas sola en la batalado por Esperanto.

Nu, la novaj eldonistoj decidis, ke Heroldo de Esperanto devos fariĝi vehiklo de pripensado kaj pripensigado pri la mondo. La devizo "Ni pripensas la mondon" montras la novan direkton de la malnova gazeto de Teo Jung. Por pripensi la mondon, Heroldo ne plu havos kiel temon nur Esperanton kaj ĝian movadon, ĝian kulturon, literaturon... resume, la vivon en Esperantujo. La fenomeno Esperanto estos traktata de Heroldo en praktiko kiel afero monduma, ne de samideanoj kiuj kunsidas en fermitaj sidejoj de E-asocioj. La samideanaro estos traktata kiel konkretaj civitanoj, kiuj havas diversajn politikajn opiniojn kaj sintenojn... kaj malsamajn alirojn rilate la mondajn problemojn. Samideanoj kiuj estas influataj de la ekonomiaj faktoroj de la praktika vivo, kiuj interesiĝas

pri edukado kaj sportoj kaj ne nur pri sia amata ĉevaleto, la zamenhofa lingvo.

Esperantistoj: konkretaj homoj en konkreta mondo, kun la potencialo transformi la mondon per la praktika uzado de la internacia neŭtrala lingvo. Jen la kerno de la gvidlinioj de la nova Heroldo, apartenaĵo de neni E-organizaĵo, neni E-tendenco aŭ grupo ligitaj al specifaj kredoj, teorioj, agadmanieroj aŭ strategio. Sociala Grupo Lexus, brazila sociala entreprenado, mastrumos Heroldon kiel tute sendependan gazeton, kaj tio signifas, ke ĉiuj estos traktataj laŭ la samaj kriterioj. Ne estos privilegioj por iu ajn kaj neni estos diskriminaciata.

Ne interesas Heroldon flegi sterilajn fiktojn kaj personajn kverelojn, tamen, ĝi ne povos ignori, ke kalejdoskopas la opinioj pri ĉio en Esperantujo kaj malsameco de ideoj kaj deirpunktoj ne estas io entute malbona, ĉar de la konfliktoj de ideoj lumo naskiĝas, kondiĉe ke la artikoloj estu respektaj al la aliaj kaj ne ilo de personaj atakoj aŭ de senfundamenta kaj sistema opoziciemo.

Por ni gravas, ke ĉies opinioj trovu sian lokon en Heroldo. Eble tio ĝenos multajn esperantistojn, ĉar bedaŭrinde toleremo kaj preteco trakti la diversecon de opinioj kiel bonvenan faktoron por la evoluo de nia komunumo foje ne estas realaĵo inter ni. Ni scias, ke tre ofte ni estos kondamnitaj pro tio, ke ni publikigos artikolojn de "ĉiuj partioj kaj tendencoj", sed kiel eblas prinpensi la mondon se ni publikigos la ideojn kaj opiniojn de nur unu "partio"? Ĉi-kuntekste, Heroldo de Esperanto fariĝos eduka forumo.

Ĝi pritraktos la aferojn internajn de Esperantujo, sed ankaŭ de la cetera mondo, de kiu Esperantujo estas nur eta parto.

Partoprenigi la esperantistojn en riĉa kaj diversa debatado de pluraj vidpunktoj pri la plej diversaj konkretaj aspektoj de la vivo de esperantistoj en konkreta mondo estos unu el grandaj atutoj de la nova Heroldo.

Nuntempe ĉiuj kontinentoj montriĝas tute maturaj por nova fazo en la historio de la internacia lingvo iniciatita de Zamenhof kaj tio alportas multe da novaj perspektivoj por nia movado, por la evoluo de la ideo de internacia lingvo. Nia ĉefa kredo estas, ke venis la momento transformi la mondon per Esperanto.

Ĉion ĉi HdE volas interpreti tra sia nova periodo, tiu de sociala entreprenado, kiu sin prezentas kiel grandan partneron de la esperantistoj.

ARTIKOLOJ

ZAMENHOF-JARO 2017 — UNESKO

Ne flagoj, sed agoj



Jolanta van Holstein

Entreprenistino
ĉe Multi Modis,
Nederlando

La Zamenhofjaro komenciĝis. Surstrate la samideanaj grupoj kun verdaj standardoj tamtame distruptetas la grandan novaĵon.

Kiu sukcesos doni al la Esperantojaro la seriozan atenton kiun ĝi meritas kaj kiel?

Oni atentigas pri la grandega ĝeno, kiun suferas sciencistoj mondscale kaŭze de la lingva baro. El ĉiuj sciencaj esploradoj kaj studoj pli ol triono ne ricevas anglan tradukon, do fakte estas ne atingebla mondscale. Multegaj sciencistoj maltrafas do gravajn novajn ekkomprenojn kaj la nova scienca scio ne sufiĉe rapide atingas homojn, kiuj povas profiti de ĝi, ekzemple kuracistoj, psikologoj, ekologiistoj k.t.p.

En la jaro 2017 Esperanto fariĝos 130 jaraĝa. Nia lingvo pluvivas kaj eĉ atingis la aĝon, kiun neni homo povas atingi.

En 2017 ni rememoras la 100-jaran datrevenon de la morto de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la brila neŭtrala lingvo internacia.

Sufiĉe da kialoj por deklari la jaron 2017, kiel la Jaron de Zamenhof. Sufiĉe da ebloj por prezenti Esperanton mondscale pere de diversaj aranĝoj kaj agadoj.

Mia persona novjara ideo estis, ke la propagado de nia lingvo — ankoraŭ tute ne konata al la larĝa publiko — povas okazi ĉi jare tre efektive. Ni ricevas grandegan kaj belegan okazon pro la speciala atento kaj mencio fare de UNESKO, diversaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. Ni havas nun, ĉi jare, specialan ŝancon.

Ne estas facile elekti la PR-strategion por io neklara kaj nekomprenbla, pli facile estas reklami kaj propagi ion pli konkretan. Mi pensas, ke en la jaro 2017, specialan atenton bezonas ricevi la lingvo Esperanto. Rigardata de laikoj kiel "artefarita lingvo", "lingvoprojekto", "morta lingvo" k.s. Esperanto estas ja vivanta lingvo, parolata de miloj, se ne milionoj da homoj en la tuta mondo. Lingvo per kiu oni povas esprimi ĉion kion oni volas, plej profundajn sentojn kaj pensojn, plej brilajn ideojn. Al ni, esperantistoj, oni ne bezonas listigi la avantaĝojn kaj la eblojn, kiujn Esperanto ofertas. Sed kiel kaj kiamaniere oni plej bone povas konvinki tiujn, kiuj ne konas Esperanton aŭ kiuj nur ion... iam... de iu... aŭdis, sed ne komprenis la mesaĝon.

Mi pensas, ke la plej bona maniero konvinki homojn al io kion ili ne konas, estas fokusiĝi kaj montri la avantaĝojn de ĝi. Homoj plej interesiĝas



Suriri la stratojn kun nia respektinda flago kaj devizo "Esperanto, la lingvo de la paco" ne helpas. Tial mi diras: "Ne flagoj, sed agoj".

pri la utilaj flankoj de produkto aŭ ideo.

Suriri la stratojn kun nia respektinda flago kaj devizo "Esperanto la lingvo de la paco" ne helpas. Tial mi diras: "Ne flagoj, sed agoj".

Mahatma Gandhi diris: "Ne ekzistas vojo al paco. La paco mem estas la vojo". Tiu ĉi simpla saĝeco estas evidente tro malfacila, ĉar la mondo ŝajnas ne povi funkcii sen perforto, terorismo kaj milito. Sed samtempe ĉiuj abomenas ilin. Tiu ĉi paradokso estas ene de la homo mem, sed ankaŭ la elturnaĵo estas trovebla ene de la homo mem! Estas sufiĉe da libroj priskribantaj la interrilaton de milito ekstere de ni kun nia interna konflikto. Esti la ekzemplo por la ĉirkaŭaĵo estas eble la plej forta konvinkilo.

La "interna ideo" de Esperanto ne allogas eksterulojn, jam ne per difino mem.

Zamenhof, kiel idealista junulo, havis noblan konvinkon, ke la manko de komuna lingvo estas la kerno de la problemo de miskomprenoj inter homoj. Observante la malamikan, streĉitan etoson inter multnacia komunumo, konsistanta plejparte el Judoj, Poloj, Rusoj kaj Germanoj en lia naskiĝloko – Bialistoko, Zamenhof revis pri paco. Kiel 10-jaraĝa junulo, Ludoviko verkis dramon "Babel-turo, aŭ la bialistoka tragedio en 5 aktoj". Li estis konvinkita, ke la ĉefa kaŭzo de miskomprenoj, malakordoj kaj kvereloj inter homoj estas la lingva baro kaj nur unu, komuna lingvo estas la solvo.

Se ni rigardas la situacion en nia mondo ni povas konstati, ke ne la manko de la komuna lingvo estas la kaŭzo de kvereloj kaj malpaco, sed plej parte la malbonvolo kompreni unu la alian. La loĝantoj de Sirio parolas ja komunan lingvon. La komuna lingvo de Islama Ŝtato kaj la loĝantoj de Sirio estas la araba. La propra karakteristika lingvo de la Islama Ŝtato estas la lingvo de forto kaj devigo. La homoj de Islama Ŝtato komprenas bonege la lingvon de perforto kaj ĝuste tiel ili volas esti komprenitaj. Ilia perforto uzas la lingvon de minaco al iu ajn kiu ĝenas ilin kaj kontraŭagas. Kaj ili fieras, ke tio ne restas nur minaco. La tuta mondo povas vidi la kaptranĉajn murdojn, milojn da fuĝantoj, la senesperajn infanojn kun hororo en iliaj okuloj...

La Islama Ŝtato ne venis neatendite, parte ili respondas la lingvon de okcidenta perforto, kiu nur pligrandigas eluzon de ilia energitroo per murdado. Kiel halti tion? Ĉiukaze forbombardi la Islaman Ŝtaton ne apartenas al realaj solvoj. Senforta dialogo povas funkcii premise la komplezo. La kondiĉoj por tio ne ĉeestas.

Restas do konsekvenca kaj firma uzado de ĉiu ajn marĝeno fari ion ajn por krei la taŭgajn kondiĉojn. Por komenci oni ne bezonas por tio pluan ruiniĝon, sed jes la kunlaboradon kaj la apogon de grupoj pri homaj rajtoj.

Progresigi la pacon eblas pere de ĉiu lingvo. Esperanto estas unu el ili. La lingvo kiun ni parolas en nia ĉirkaŭaĵo abundas de perforto kaj malamo, bedaŭrinde, ankaŭ inter esperantistoj.

La plej efika komunikado estas la komunikado bazita sur faktoj, sentoj kaj bezonoj, kaj sur la respekto de unu al alia.

Se ni volas apliki la pacan komunikadon unue ni devas ŝanĝi la manieron kiel ni vidas nin mem kaj aliajn kaj kiel ni plenumas niajn bezonojn.

La lingvo de la paco estas malperforta komunikado. Esperanto estas unu el 7000 diversaj lingvoj kiuj povas helpi lerni paroli la lingvon de paco. Paroli la lingvon de paco helpas nin tiamaniere kontakti aliajn homojn kaj elfluegi libere nian denaskan kompton. Ĝi estas la plej efektiva maniero, kiun ni povas apliki ĉie en la tuta mondo — ene de familioj kun grandegaj problemoj, en perturbitaj burokrataj kaj en militdetruitaj landoj. Paroli la lingvon de paco signifas apliki neperfortan komunikadon, kiu donas al ni la ŝancon malaltigi la gradon de konfliktdanĝeroj kaj helpi solvi ilin.

La artikoloj publikigitaj ne reflektas la opinion de Heroldo de Esperanto. Ili celas stimuli la debatadon rilate la diversajn alirojn al lokaj, naciaj kaj internaciaj temoj. Sendu vian artikolon kun mezume 450 vortoj al redakcio@heroldodeesperanto.com.

LEXUS

Fondita en Goiânia
(Brazilo), aprilo 2016

Fondintoj
Fabrício Valle
Paulo Lima (1966 - 2017)

Sidejo
Trindade - GO

Poŝta Adreso
Caixa Postal 476 - AC Central
74.001-970 Goiânia - GO

CNPJ
(Federala enskribo)
26.073.2380001-30

Heroldo
de Esperanto
Ni pripensas la mondon

Fondinto
Teo Jung (1892 - 1984)
http://bit.ly/Teo_Jung

Redakcia Direktoro
Fabrício Valle

Ĉefredaktoro
Vakas

Korespondantoj
Massimo Ripani

Kolumnistoj
Amri Wandel (Scienca
Heroldo) - Ana Bartek (KCE
Informas) - César Dorneles
(Jes ja) - Fernando Pita
(Plurtemare) - Renato Corsetti
(Per/Por Esperanto) - Giorgio
Silfer (Diagonale)

Grafikisto
Eric Kaji

Reta versio
www.heroldodeesperanto.com

Retadreso
Redakcio
redakcio@
heroldodeesperanto.com

Abono
abono@
heroldodeesperanto.com
Publikigo de Reklamoj
kontoro@lexussocial.com

Ankoraŭ Eŭropo! Ĉu ankoraŭ Eŭropo?



Carlo Minnaja

Denaska E-parolanto,
vortaristo kaj membro de
la Akademio de Esperanto

La 25an de marto kunvenas ŝatestroj kaj gravuloj de la mondo por celebri la 60an datrevenon de la subskribo de la Romaj Traktatoj kiuj markis la starton de la Eŭropaj Komunajoj kiuj poste evoluis al Eŭropa Unio. Ĉu tiu sperto estu konsiderata sukcesa, aŭ pravas la partioj kaj pensoskoloj kiuj verdiktas la eksperimenton finita kaj, se plu daŭrigata, malavantaĝa aŭ eĉ noca por la eŭropanoj?

La Nobel-pacpremio atribuita al la Eŭropa Unio en 2012 havis kiel motivaĵon la jenan: dum pli ol ses jardekoj ĝi kontribuis al la antaŭenigo de la paco kaj de la demokratio kaj de la homaj rajtoj en Eŭropo. Malfacilas kontesti la fakton ke francoj kaj germanoj, kiuj dum mil jaroj sange batalis inter si, nun dum pli ol duonjarcento demetis la armilojn. Tio ja ne signifas, ke ĉie regis paco, nek ke iuj eŭropaj nacioj, sub aliaj ŝildoj aŭ per nerektaj loĝistikaj helpoj, sin detenis de militaj operacoj kiujn normala perspektivo klasus agresaj. Kaj devas ankaŭ estis agnoskate, ke iuj decidoj de la eŭropa Parlamento aŭ de eŭropaj komisionoj en la kampo de agrikulturo, de mediprotekto, de distribuo de la ekonomiaj rimedoj, estis ja avantaĝaj

por iuj eŭropaj popoloj kaj malavantaĝaj por aliaj laŭ la respektivaj politikaj kaj ekonomiaj fortoj. Tamen la bilanco de 60 jaroj devas esti konsiderata pozitive: popoloj kiuj elvenis el diktaturoj estis gvidataj al demokratio sen revolucio kaj ankaŭ, se nur modere, sen sangaj venĝoj; de Eŭropo ĉerpis inspiron aliaj regionoj de la mondo en sia strebo al unueco kaj moderneco. Kaj, laste sed ne plej malgrave, la averaĝa vivlongo kreskis konsiderinde, al Eŭropo venas amase ekstereŭropanoj, ĉar Eŭropo kapablis konstrui, kvankam venante el katastrofaj detruoj, pli stabilan kaj justan labormerkaton, pli efikan sanitaran servon, pli facilajn komunikojn, pli allogan vivnivelon. Multo estas ankoraŭ pliboniginda, multaj malekvilibroj devas esti kvitigataj, ankoraŭ la eŭropa identeco estas apenaŭ sentata (kiam ajn oni aŭdas la eŭropan himnon?) sed la landoj kiuj iom post iom petis aliĝon al Eŭropa Unio devigante sin al respekto de iuj fundamentaj principoj (kiel la abolo de mortpuno) ja havis kaŭzon.

Tamen Eŭropo restas konstruo nekompleta kiu riskas kolapson, se ĝi ne estas rapide kompletigita; la foriro de Britio estas tre misaŭgura knaro,

terorismo trafas eŭropajn ĉefurbojn, de Madrido al Parizo, de Nico al Berlino, de Bruselo al Londono (dum mi skribas ĉi liniojn la lasta atenco ĉe Buckingham Palace estis ĵus anoncita ĉe la televido). Timo disvastiĝas, kvankam la komuna sento releviĝas el la emocio kaj eĉ la hodiaŭa tragika evento morgaŭ estos jam dampita kaj asimilita ĝis la venonta atenco.

Ekonomio kun peno startas denove post grava krizo kaj Eŭropo perdas influon en globalizita mondo regata de potencoj kun superkontinenta dimensio; la eŭropaj ŝtatoj ne havas estontecon se ili restas dividitaj. Ili havas komunan landlimon, do ili devus havi komunan gvardion por ilin kontroli; ĉar la apudaj regionoj estas ne ĉie stabilaj, Eŭropo devus kune klopodi dampi la internaciajn krizojn kaj konfliktojn, kaj ĝi ne havas la forton, ĉar ne ekzistas komuna planita streĉo tiucela. Ĉar la naciaj demokratioj ne povas regi la politikajn kaj ekonomiajn fortojn trans siaj landlimoj nur efika kaj konscia eŭropa komuna demokratio permesos al la eŭropaj civitanoj rehavi la kontrolon pri sia destino: Eŭropo de la espero kontraŭ Eŭropo de la timo.

La 200-jariĝo de la lingvo Esperanto



Fabrício Valle

Eldonisto, redaktoro kaj
E-entreprenisto

En preskaŭ ĉiuj landoj Esperanto estas instruata en la lernejoj. En Brazilo, de multaj jaroj la leĝo de senatano Cristovam Buarque estis aprobita kaj dum la sekvaj jaroj la instruado de Esperanto estas iom post iom enkondukita en la lernejojn. Same tra la tuta mondo, ĉefe post la decido de Unesko adopti la internacian lingvon, sekvante la rezolucion de la jaro 1954. Sed ne nur en la publikaj lernejoj la lingvo iniciatita de Zamenhof estas instruata. Ĉiuj lingvo-lernejoj instruas ĝin kiel propedeŭtikan lingvon, sub la influo de novaj eksperimentoj pri tiu aspekto de Esperanto, kiuj konfirmis ĝian utilon en la lingvo-instruado. La fenomeno Duolingo, en la dua jardeko de ĉi-jarcento, estis nur eta signo de grandaj ŝanĝoj en la industrio de lingvo-instruado, kiu poste fariĝis konata kiel novbabelismo, nome la instruado de Esperanto kiel bazo de la instruado de lingvoj, ne plu surbaze de premo por la subteno de la privilegioj de la angla, kiu nun ne plu estas konsiderata kiel internacia lingvo. La Manifesto de Prago ludis gravan rolon en la konsciigo de la popoloj pri siaj lingvaj rajtoj. Krome, ĉiuj klare vidis, ke la privilegioj de la angla en la industrio de la lingvo-instruado signifas altegan profiton por nur la anglalingvaj landoj. Nun ĉiu lernas sian lingvon denaske, Esperanton ekde infano kiel duan denaskan lingvon kaj ĉiuj lernas sian unuan fremdan lingvon laŭ tute libera elekto. Multaj ankoraŭ elektas la anglan, sed multaj elektas lerni la norvegan, la portugalan, la rusan, la hispanan, la germanan, la francan, la gvaranian, la polan, la svedan, la svahilan kaj aliajn afrikajn lingvojn ktp, ĉar neniu plu decidas lerni fremdan

lingvon surbaze de la propagando, ke la angla estas la internacia lingvo, ĉar ĉiuj scias, ke ja Esperanto estas la internacia lingvo.

Pro tio Esperanto gravege rolas en ĉiuj sferoj de la diplomatio kaj internaciaj organizaĵoj, kiel UN. La monda ekonomio funkcias per Esperanto. La turismo intense uzas Esperanton. La sciencaj kaj universitataj eventoj okazas nur en Esperanto. La eldonejoj de sciencaj libroj decidis en la tuta mondo uzi nur Esperanton.

La internacia lingvo, kiu antaŭ kelkaj jardekoj estis parolata nur de manpleno da homoj, konataj kiel esperantistoj, nun estas parolata de ĉiuj popoloj kaj ne plu bezonas movadon por ĝin diskonigi kaj instrui. Venis la fina venko, sed kio okazis al la bravaj esperantistoj kaj iliaj E-asocioj?

LA TRANSFORMADO DE LA ESPERANTO-ASOCIOJ

Fakto estas, ke E-asocioj kiel tiuj, kiuj ekzistis ĝis la fino da la 200-jardeko ne plu ekzistas. Multaj mortis pro tio, ke ilia gvidantaro kaj membroj rezistis al la grandaj ŝanĝoj okazintaj kaj insistis resti agantaj nur surbaze de "diskonigado kaj instruado de Esperanto", ne antaŭvidante, ke la atingo de la fina venko signifus morton de la tradiciaj E-asocioj. Ĉar la instruado de Esperanto en publikaj lernejoj kaj privataj lingvo-lernejoj furoregis ekde 2020, la foje amatora kaj improvizita sistemo de E-instruado de la movadaj asocioj kolapsis. Diskonigado de Esperanto fariĝis neutila aktivejo, pro tio ke ĉiutage Esperanto estis citata en televidstacioj kaj grandaj

revuoj kaj ĵurnaloj kiel laborlingvo en ĉiuj kampoj de la homa vivo.

Bonŝance multaj E-asocioj kapablis antaŭvidi la estontan scenejon kaj adaptis sian agadon per elekto de praktikaj celoj de la tria sektoro (de la tiel nomataj ne-registaraj organizaĵoj).

Multaj elektis nur unu punkton de la Celaro 2030 kaj vigle sin ĵetis al plenumado de ambiciaj projektoj. Tre vasta semado okazis por estigo de laboro por senlaboruloj. Sur la kampo de la sociala turismo, granda reto de malmultekostaj hoteloj, kie Esperanto parolatas, estis kreita kaj plu kaj plu vastiĝas ĝis hodiaŭ. La batalado kontraŭ malsato, analfabeteco, militoj, manko de sanflegado ĉe malriĉaj kvartaloj de urboj en multaj landoj... la defendo de la naturo... la flegado de senhelpaj orfoj... la konstruado de lernejoj en afrikaj kaj sudamerikaj landoj en la periferioj de la grandaj urboj, kie antaŭe infanoj havis lernejojn de malhonestajtoj... la flegado de la arto kaj de la kulturo... ĉio fariĝis celoj de la E-asocioj, vidinte, ke baldaŭ ne plu havus ian ajn sencon labori por diskonigo kaj instruado de Esperanto sed jes ja uzi Esperanton en la praktiko.

Ĉiuj E-asocioj, de la plej etaj al la plej grandaj kaj internaciaj, fariĝis fakaj asocioj. Vere, oni simple elektis novan finan venkon, la venkon kontraŭ la mizeraĵoj moralaj kaj materialaj de stulta mondo. Heroldo de Esperanto havas la honoron, en la 200-jariĝo de Esperanto, esti partopreninta tiujn grandajn ŝanĝojn de celoj, surbaze de la kredo, ekde sia 1-a numero de la jarkolekto 2017, ke Esperanto ne naskiĝis nur por esti amata ĉevaleto por sataj homoj aŭ studobjekto de profesoroj, sed lingvo por transformado de la mondo.



Esperanto naskiĝis por esti lingvo por transformado de la mondo

INTERNACIA LABORLINGVO La praktika aplikado de Esperanto tra la mondo

Reliefe

ĈEFMOTORA NRO

Estas planata en Brazilo fondo de nova internacia NRO, kiu ĉefa celo estos roli kiel naskiĝejo kaj flegejo de NROj sur diversaj kampoj, kies laborlingvo estos Esperanto.

Krom ĉi tiu ĉefa celo, la nova NRO, kiu ankoraŭ ne havas nomon, agados novbabelisme kiel komumuma lingvo-lernejo kaj defendando de la lingvaj rajtoj. Jam oni engaĝigas por ĝin fondi ĝis la fino de 2017. Se interesas vin esti kunfondanto, bonvolu peti pliaj informojn al social@lexussocial.com.br

TRIA SEKTORO

La unua sektoro estas la ŝtato, la dua la libera iniciatado profitcela, la tria konsistas el Neregistaraj Organizaĵoj. Neprofitaj celoj ne signifas neprofesie agadi kaj ne lukri, sed ne finance regali membrojn kaj estraranojn de NRO per la lukro.



UEA: FAKAJ ASOCIO

En la jarlibro de UEA estas listigitaj 23 fakaj asocioj. Ĉiuj estis invitataj sendi novaĵojn pri sia agado al Heroldo de Esperanto, ĉar faka agado prioritatas por ni.

NRO EN AFRIKO

Laŭ Vikipedio, "Scio Sen Bariloj (SSB) estas NRO - Neregistara Organizo kreita en la jaro 2009 fare de beninaj kaj svisaj personoj, ĉefe esperantistoj. Ĝia prezidanto estas Privas Tchikpe el Kotonuo, Benino. En la komitato membras Mireille Grosjean el Svislando."

Ni esperas vidi multle da novaĵoj pri SSP en HdE.



Vole-nevole Esperanto iom post iom fariĝos amasingvo uzinda en ekonomio kaj en la tria sektoro

Fabrício Valle

Direktoro de Sociala Grupo Lexus

INTERVJUO

HENRI MASSON

“Edukado estas la plej potenca armilo, kiun oni povas utiligi por ŝanĝi la mondon” – Mandela.

Henri Masson (<http://bit.ly/HMasson>) esperantistiĝis kiam li estis 27-jara en 1970 en Parizo. La unuaj E-organizaĵoj al kiuj li membriĝis estis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj SAT-Amikaro. Poste li abonis la gazeton *Heroldo de Esperanto* kaj la revuon *Esperanto*.

Kvankam lia agado koncentriĝis ĉirkaŭ SAT, li tamen informiĝis pri la situacio kaj evoluo de la lingvo ekster ĝi.

Henri Masson laŭeble plej ofte strebis rapide adapti sian agadon al la politikaj cirkonstancoj kaj okazaĵoj en Francio kaj sur la internacia scenejo. Li diras: “Eble tiu agmaniero fortiĝis en mi kiam mi devis transpreni la respondecon de

la Rebatservo de SAT-Amikaro en 1977.” Tiu servo celis reagi al misprezentoj de Esperanto aŭ atakoj kontraŭ ĝi en amasinformiloj. Por ĝin krei Henri Masson arigis kelkdek el la plej kompetentaj membroj de SAT-amikaro kaj ankaŭ kelkajn nemembrojn. Radioĵurnalisto de *France Inter* iam diris ke “la esperantistoj estas tre reagemaj”.

Li korespondis en Esperanto kun ĉeroka esperantisto, N.I. Sequoyah (Bill Ray Waldon), kiu de multaj jaroj estas en la koridoro de la morto en la kalifornia ŝtata malliberejo de San Quentin kaj klopodoj de diversaj organizoj por ebligi lian liberigon malsukcesis.

Fabricio Valle

redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com

Kiel preskaŭ 50-jara veterana esperantisto, vi travivis plurajn fazojn de la E-movado. Kion pri la nuna Esperantujo vi povas diri al ni?

Komence de la jaroj 1990, la uzo de elektra skribmaŝino kun korektebleco kaj memordisketo estis jam komenco de miraklo. Tio nun ridetigas nin. Poste venis la tempo de Macintosh kun pli granda memorkapacito. Tio konsiderinde plimultigis la laboreblojn. En 1997, mi komencis uzii interretan. De tiam okazis gravaj transformiĝoj en la landaj kaj internaciaj interŝanĝoj. Membroj de diversaj asocioj povis interkomunikiĝi. La kreo de retejoj kaj blogoj ebligis interesajn malkovrojn. Tamen la asocioj, ne nur poresperantaj, ne plene profitas el tiu nova situacio. Multaj malfortiĝis pro perdo de membroj. Kelkaj asocioj malaperis, sed aliaj estis kreitaj. Uzantoj de la lingvo sentas malpli la bezonon aliĝi al asocio kaj pagi kotizon. Tio estas solvenda problemo.

Vi priskribis la evoluon de la rimedaro je nia dispono kaj finis per priskribo de ŝanĝo de sinteno kiu kernas en la ŝrumpo de la intereso pri la tradicia E-asociaro, sed kio pri la evoluo de la ideoj, kiuj igas la esperantistojn agi? Ĉu okazis neniu ŝanĝo sur tiu kampo? Ekzemple, kion diri pri konceptoj kiel raŭmismo kaj finvenkismo, pri kiuj oni ankoraŭ disputetas?

Pri raŭmismo kaj finvenkismo mi neniam interesiĝis. Oni devus pli

ĝuste, tamen iom ŝerce, kun rideto, paroli pri “finna malvenko”, ĉar la urbo Raŭmo, kie oni lanĉis la Manifeston de Raŭmo (deirpunkto de la raŭmismo) kadre de IJK en 1980, troviĝas en Finnlando. Perdiĝis tro da tempo kaj fortoj en tiu temporbato, beda kaj sterila disputado.

Unua venko estis jam atingita en tio, ke Esperanto ne eniris la tombejon de pli ol mil fiaskintaj lingvoprojektoj.

Jam en la unuaj paĝoj de la Unua Libro, Zamenhof fiksis al si modestan celon: “Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne, tio estas, ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internacia komunikado.”

Do, efektive Esperanto jam estas uzata. Ni celu, ke ĝi estu pli vaste uzata, tiel ke homoj trovos nature en ĝi kreskantan utilon kaj allogon. Teoriumado kaj debatoj pri la vojo al venko ne stimulas interesecon kaj ne venigos amasojn al ĝi.

Kion diri pri la granda misio de Esperanto kaj kiel ĝin atingi? Cetere, ĉu ekzistas granda misio de Esperanto?

Pri misio, jes, ni relegu la paroladojn de Zamenhof en Bulonjo ĉe Maro, Ĝenevo, Guildhall en Londono, lian respondon al la fondota Hebra Ligo kaj aliajn dokumentojn. Li konis la limojn de neŭtraleco. Estas cirkonstancoj en kiuj silento estas kondamninda. Kiel apliki nuntempe liajn pensojn? Mi kredas, ke li tre



Orwell diris “Popolo, kiu elektas koruptajn politikistojn, trompistojn, ŝtelistojn kaj perfidulojn ne estas viktimo... sed komplico”. Neŭtraleco povas esti formo de kompliceo.

malĝojus pri la politika simplismo, kiu kredigas, ke estas demonoj unuflanke – ekzemple en lia lando, Rusio – kaj anĝeloj aliflanke – ni diru pli ĝenerale en Okcidento, inkluzive de lia naskiĝlando, Pollando. Sed tio postulus tro longan klarigon.

Se paroli pri neŭtraleco, estas konata la devizo de Lanti, la fondinto de SAT, nome “For la neŭtralismon!”. Aliflanke, neregistaraj organizaĵoj kiel UEA fakte nepre devas esti neŭtralaj. Sed kiel kompreni la koncepton “neŭtraleco” aplikata al Esperantujo, en mondo kie abundas maljustaĵoj, malrespekto al la homaj rajtoj, malsato kaj multe da aliaj abomenindaĵoj?

Unu el la plej grandaj figuroj el la historio de Esperanto, Hector Hodler, fondinto de UEA, konsideris, ke absoluta neŭtraleco ne eblas. Cetere ekzistas tre interesa dokumento de Claude kaj Andrée



Gacond interrete trovebla sub la titolo Hector Hodler: Koncerne la konflikton paco-milito neŭtraleco ne eblas. Mi kredas, ke estus utile fari filmon, aŭ almenaŭ videon, pri lia vivo kaj agado.

Neŭtraleco estas komforta situacio, sed komforta ne signifas prava. Orwell diris “Popolo, kiu elektas koruptajn politikistojn, trompistojn, ŝtelistojn kaj perfidulojn ne estas viktimo... sed komplico”. Neŭtraleco povas esti formo de kompliceo.

Tamen ne mankas rifoj se oni volas influi politikon en pli homeca direkto. Tio estas ege malfacila en mondo en kiu informado pli similas al propagando, en kiu la amasinformiloj estas sub regado de partioj, religioj aŭ miliarduloj.

Ŝajnas, ke ni nun travivas mondan grandan krizon. En multaj okazoj la esperantistoj restas dividitaj pro sia opinio rilate la enlandajn politikajn okazaĵojn kaj internaciajn problemojn, kiel ekzemple la situacio de la enmigrado en Eŭropo, Islamo, terorismo. Ĉu la neŭtrala movado plu restu neŭtrala aŭ ĉu la esperantistoj prenu pli aktivan rolon en la mondo?

Ekzistas reĝimoj, kiuj strebas krei “eksterlandan malamikon”, revivigi iamajn antagonismojn, aŭ vivigi novajn kiam tio ne ekzistas. Evidente, la “interna ideo” de Esperanto ne estas bonvena por ili. Per kreo de konflikta situacio inter popoloj, kiuj ne havas kialon malami sin reciproke, ili trovas eblon deturni la atenton de la amasoj de internaj problemoj kaj skandaloj.

George Soros, kiun mi tute ne estimas, kreis kaj financas la fondaĵon Open Society (Malferma Socio). Li financis agadojn, kiuj dissemis haŭson kaj estigis etoson de malamo kaj konflikta situacion interne de landoj, interalie kaj precipe en Ukrainio.

Kiel financa spekulisto, li ne povas kompreni principojn de honesteco. Lia sola patrio kaj dio nomiĝas “mono”. Li tamen prave diris en 2003: “Pro la milito en Irako, ni kreas pli da teroristoj ol ni sukcesos mortigi da ili.” Li estus farinta nekompareble pli grandan servon al la homaro per financado de la plej elstaraj iniciatoj de la E-movado, kiel la Fondaĵo pri Esperantaj Studoj, Edukado.net, Lernu kaj kelkaj aliaj.

Bone, sed kio pri la rolo de esperantistoj en la mondo?

Krom Hodler, kiun mi antaŭe menciis, estis ankaŭ Edmond Privat, engaĝita mondevivanto. Mankas nun al Esperanto homoj kun simila intelekta kaj morala grandeco. Tamen tio povas reaperi ĉar ni povas konstati, ke fiaskis ĉiuj politikaj ideoj kaj vojoj, kiuj havis pli-malpli vastan kaj fortan influon tra la mondo de post la apero de Esperanto kaj kiuj tenis ĝin en la ombro. Ŝajnas, ke estingiĝis la kandelo en la kapo de l’ homoj.

Devus inspiri nin la firma parolado de Zamenhof en Guildhall, kiam li aludis pri ĝusta kompreno de patriotismo. La disvastiĝo de Esperanto okazis sen sango, nek larmoverŝo, sen ruinigo de urboj kaj multformaj detruoj, interalie de la vivmedio.



Okaze de la inaŭguro de "Rue de l'espéranto" (Esperanto-strato) en la vilaĝo kie Henri Masson naskiĝis kaj vivis sian junecon kaj kien li revenis en 1995 post emeritiĝo.

Hodler kaj Edmond Privat vivis en epoko sen la nuntempaj rimedoj pri informado kaj komunikado tamen tiam estis epoko de grandaj ideoj, grandaj iniciatoj. La nuntempa Esperantujo ŝajnas droni en kvereloj pri liliputaj. Ĉiuj agas tre individuisme kaj interreto stimulas izolitan agadon, ĉu per blogo, ĉu per Facebook ktp. Oni multe bla-bla-blaumas sed kie estas la grandaj ideoj stimulantaj konkretan agadon? Ĉu ni serĉu ilin nur en la zamenhofaj paroladoj, en la agado de forpasintaj E-korifeoj? Kio mankas al UEA, SAT, Esperanta Civito, landaj kaj fakaj asocioj kiel spronantoj de la kolektiva agado por kaj per Esperanto? Ĉu ni estas kondamnitaj al izolitaj laborfrontoj kaj senfinaj kvereloj?

Tamen Edmond Privat estis pioniro de la radiofonio per mallongaj ondoj, fondinto de Radio Genève. Sur tiu tereno estis ankaŭ inter aliaj Pierre Corret, Eŭgeno Aisberg, kies verko Mi komprenas fine la radion! aperis en ne malpli ol 16 lingvaj versioj. Privat dialogis kun multaj eminentuloj, eĉ ŝtatestroj. Mankas nun tiaj figuroj, kiuj povus doni estimindan vizaĝon al Esperanto. Bedaŭrinde, la morto de la Nobelpremiito Reinhard Selten lasas nin orfaj.

Estas ankoraŭ nun loko por ni por esti pioniroj sur multaj terenoj, inter aliaj ekologio, novaj puraj kaj neelĉerpeblaj energioj, faciligo de la komunikado...

Diskonigindaj kaj subtenindaj estas agadoj celantaj aplikon de Esperanto en la ĉiutaga vivo, aparte

profesia, en scienco, tekniko, komerco, medicino. Paŝoj ekzistas en tiu direkto, ekzemple la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) aŭ la Konferencoj pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST).

Estas fakto ke blablablumaĵo okupas tro da loko malprofite al agado, kaj mi ne volus, ke ĉi tiu intervjuo estu plia blablablumaĵo (rideto...).

Estas tamen rimarkinde, ke aperas, konstruiĝas kaj disvolviĝas utilaj strukturoj. Ne eblas ĝuste taksi ĝis nun la efikon de la "fenomeno Duolingo" sed mi demandas min ĉu la lernantoj povas tuj malkovri la vojon, kiu taŭgas por ili en uzado de la lingvo. En lingvokursoj, ankaŭ interretaj, parolaj, publikaj, lernejoj, ĉu oni sufiĉe montras diversajn interesajn facetojn de la lingvo, ĉefe en ĝia ebla praktika aplikado? Estas vere grave, ke ĉi tiu nova lernanto rapide malkovrusian ĝustan vojon, ĉar tio estas la plej efika instigo al plua lernado, al efektiva praktikado, al esplorado kaj malfermo de novaj vojoj.

Nu, ni parolu pri novaj vojoj kaj pri aplikado de Esperanto. Ĉu ne estus pli avantaĝe por Esperanto, se ĉiuj esperantistoj komencus pensi pri ĝi kiel laborlingvo kaj ne kiel amata ĉevaleto, intelekta hobbio kaj similaĵoj... kaj la E-asocioj nun dediĉitaj al nur diskonigado aŭ/kaj instruado de Esperanto adoptus specifajn kaj fakajn celojn?

Certe ni devas eliri el nura amika babilado aŭ banalaj interŝanĝoj. Nepre necesas transiro al kreemo, inventemo, eltrovo de pra-

ktikaj aplikoj de la lingvo, ekzemple por turismo, por muziko kaj kanto, kunlaboro por Vikipedio aŭ WikiTrans por enciklopedia laboro, disvolvo de pedagogiaj metodoj kaj milfoje ktp. Ankaŭ humuro indas je atento. Ekzercado en traduko de artikoloj de katalogoj pri varoj, materialoj, iloj, modo ktp povas esti ege utila ekzerco. Se ni volas, ke Esperanto ricevu atenton en ekonomio, komerco, scienco kaj tekniko kaj ĉiuj sferoj de la vivo, ni devas pruvigi aplikeblecon kaj eĉ aplikatecon. Ni devas konscii, ke Esperanto ne eliros el la densa ombro de la angla lingvo tiom longe, kiom oni ne aŭdacos reagi al kvazaŭ religia kredo laŭ kiu ĝi jam estas la mondlingvo, kion fakte anoncis la 17-an de januaro 2008, ĉe BBC, la tiama brita ĉefministro por lanĉi radikalajn kampanjon de lingva koloniigo en Ĉinio kaj rekoloniigo en Barato. Kompreneble li ne uzis la vorton "koloniigo", sed ĉu la tuta homaro forgesis la historion de la Imperio? Do, jes, ni proponu Esperanton en la rolo de laborlingvo en kunteskto de justa lingva komunikado.

Se paroli pri aplikado de Esperanto, vi verks interesan broŝuron, nome Kio estas SAT?, kiu prezentas en ĝeneralaj trajtoj tiun organizaĵon al la legantoj. Kio pri la spirito de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)?

De kiam aperis tiu broŝuro, okazis multege da eventoj, kaj oni transiris al nova jarcento, kiu komenciĝis ne pli bele ol la antaŭa. La spirito de SAT estas grandparte inspirita de la interna ideo, kiun Zamenhof donis al Esperanto, sed Zamenhof ne estis politikema kvankam li foje esprimis sin tre firme ekzemple pri amo al patrio, pri naciismo, religia ekstremismo ktp. Zamenhof agnoskis en letero de 1910 al Der Arbeiter Esperantist, ke la laboristaro eble iam perceptos la esencon kaj utilecon de la internacia lingvo. SAT aperis en 1921, do post lia morto, kaj ĝi kontribuis al aplikado de Esperanto sur tiu specifita tereno. Ĝia rolo estas ne malpli aktuala ol en 1921.

“

Eĉ se Zamenhof ne estis politikema, li tamen lasis al ni principojn kaj regulojn, etikon, kiuj povas eble aspekti tro religiemaj sed kiuj respondas al kriterioj de logikeco.

En la broŝuro Kio estas SAT? vi skribis, ke "Estas fakto, ke interpopolaj rilatoj povas komplete ŝanĝiĝi per edukado".

Tiu broŝuro aperis en 1985, kaj konfirmon pri tio oni povas trovi en postaj citaĵoj de Nelson Mandela en 2007: "Edukado estas la plej potenca armilo, kiun oni povas utiligi por ŝanĝi la mondon" kaj alia de juna pakistana lernantino viktimo de atenco de talibanoj, Malala Yousafzai en 2013: "La sola afero kiu povas lukti kontraŭ terorismo estas edukado".

Kio pri UEA kaj aliaj laborfrontoj?

Malfortiĝo aŭ malapero de UEA estus malbona afero, sed momente mi ne havas ideojn por igi ĝin pli efika, utila, alloga, por ke ĝi fariĝu entuziasmiga kaj populara fenomeno. Fortiĝi per malfortiĝo de aliaj ne estas bona afero. Tio estas la principo de hegemonio, kiun oni ne ŝatas en internaciaj politikaj rilatoj.

Ni estas nun en mondo en kiu falis multaj certecoj pri politiko, religio, vivo en la socio. Multaj homoj sopiras al vivnivelo simple deca, sed pri tio fajfas tiuj, kiuj vivas en komforto. Por ili, tio estas bona kaj kontentiga ordo, precipe se ili vivas en lukso kaj sen zorgoj.

Certe estas nesufiĉo da horizontalaj interŝanĝoj. Sed en la mondo de Esperanto, same kiel en tuta mondo, la fluo da informoj tiel grandas, ke ofte oni mistrafas la plej valorajn kaj utilajn.

UEA reagis kaj klopodas ĝisdatigi sian strukturon per statuta reformo, sed eĉ kun forta UEA, Esperanto ne povas dependi nur de unu organizaĵo. Kiel vi diris, horizontalaj interŝanĝoj malmultas. Eble venas la momento por ŝanĝi la strategion iri per unu sola vojo kaj atendi multegon nur de UEA, kvankam ĝia rolo gravegas kaj meritas ĉies apogon. Falas la certecoj pri la movadaj strukturoj. Abundas demandoj: Kien ni iras? Ĉu mankas io? Kiel plu agadi por Esperanto? Kiel solvi la E-konfliktojn en Afriko?

Bonaj aferoj tamen okazas sen la organizita E-movado. Kiun koncizan interpreton vi povas prezenti al niaj legantoj de tiu kompleksa situacio?

Mi mem ne konas miraklan solvon aŭ vojon. Sed mi vidis belajn sukcesojn.

Lasu al niaj legantoj viajn lastajn vortojn.

Mi ne estas religieca sed mi memoras citaĵon de Pierre Teilhard de Chardin, franca jezuita pastro, paleontologo, teologo kaj filozofo: "Ĉio supreniranta konverĝas". Kvankam tio koncernas religion, tio estas aplikebla eĉ se oni estas liberpensema aŭ libercredema. Tio estas, ke ĉiu elektu la vojon sur kiu oni sentas sin plej kapabla riveli siajn talentojn, alporti ion bonan, utilan, valorigan por si mem kaj por la socio. Kaj tiel iam okazos proksimiĝo, konverĝo.

Multaj abomenas politikon. Mi ne estas adoranto de ĝi, sed politiko estas ofte abomena pro tio ke ni lasas abomenindajn homojn kapti la regpovon. Ĉiu el niaj ĉiutagaj gestoj havas politikan konsekvencon, ekzemple se ni aĉetas oranĝojn, sekiĝitajn figojn aŭ avokadojn de lando sub totalisma reĝimo prefere al alia.

Ni tamen atentu, ke Esperanto perdos respektindecon se ĝi alianciĝos kun malhonestaj kaj totalismaj reĝimoj. Eĉ se Zamenhof ne estis politikema, li tamen lasis al ni principojn kaj regulojn, etikon, kiuj povas eble aspekti tro religiemaj sed kiuj respondas al kriterioj de logikeco.



Hago, NL, 1983 — Manifestacio kontraŭ la neutrona bombo

Esperanto en la lando de la spegulo

Navigi
necesas

Ekde nun ni ĉiuj vivos
mirindan aventuron

Fabricio Valle

redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com

Kion eblas trovi tie, en la lando de la spegulo? Eble Lewis Carroll povos helpi nin, ĉar li verkis *Alice en la lando de la spegulo*, post *Alice en Mirlando*, ĉu? Sed Esperantujo ne estas mirlando (ĉu vere?) kaj nia lando de la spegulo povos meti sur nian vojon pli da konkretaj ŝtonoj ol ni kapablos imagi. Eble ni estos senhelpaj, sed se aliaj esperantistoj jam klopodis trovi reflektajn de nia arto kaj kulturo trans la spegulo kaj multe da kunlaborantoj engaĝiĝis en la aventuro, kial ni ne daŭrigu tiun mirindan aventuron? Fakte estas, ke Spegulo ne rompiĝis... nur dum certa tempo silentis kaj Heroldo de Esperanto elektis tiun nomon por sia kajero de arto kaj kulturo por denove elokventi laŭ la reĝisorado de niaj plej talentaj samideanoj. La elekto de tiu nomo okazis tute hazarde, laŭ propono de Paulo Lima, la nelonge forpasinta kunfondinto de la nova eldonejo de Heroldo. Nek li, nek mi sciis pri la ekzisto de iama revuo nomata Spegulo, kredo min! Kiam ni eksciis, ĉar mi havis la intuicion esplori kion la orakolo Google respondus al la vortoj "Spegulo Esperanto", mi decidis lasi tiun nomon, post kiam mi malkovris, ke la unua Spegulo ne plu ekzistas. Ni eĉ ŝatis, ke ni povus agi kiel revivigantoj de la pola revuo, kiu havis principojn tiom similajn al la niaj.

Do, vi, kiu staras antaŭ via propra spegulo (via blogo, via reta ruvoeto) kaj foje en la speguloj de la aliaj revuoj (revuoj de aliaj eldonejoj) kaj verkas poemojn, rakontojn, eseojn, mikronovelojn, hajkojn, tradukas literaturaĵojn, ellaboras recenzojn laŭ la plej rigoraj kriterioj... vi, kiu pensigas nin pri la arto kaj kulturo en Esperantujo...vi, kara kunkreanto de nia arto, de nia kulturo, de nia literaturo, vi nun havas je via dispono grandan Spegulon, kiu estas tute preta reflekti vian talenton.

“

En vintra kaj malvarma posttagmezo, dum la neĝo silente falas ekstere, Alice ludas kun la katino Dinah kaj ĝiaj idoj en la hejma salono. Ĝi ne povas diveni ke tre baldaŭ ĝi vivos mirindan aventuron. Subite ŝi trairas la spegulon kaj restas ĉe la fajrujo kaj alvenas en mondon kie ĉio estas inversigita, la kruroj supren: floroj parolas, ŝakpecoj paŝas kaj ju pli vi kuras, des pli vi restas surloke. Mondo en kiu la aĵoj interŝanĝas la flankojn, same kiel la linioj de libro, kiam vi observas ĝin malfermita antaŭ spegulo.

Tie, en la domo de la spegulo estas ankaŭ la roluloj preferataj de la infaneco de Alice: la ĝemeloj Tweedledum kaj Tweedledee, la Rosmaro kaj la Ĉarpentisto, la Leono kaj la Unukornulo, la fiera Humpty Dumpty, la provokema Ruĝa Reĝino.”

Ekde nun, ni kune faras la unuajn paŝojn en la lando de la Esperanta Spegulo.



Outsiderzone

LA IAMA SPEGULO

“Spegulo estis pola esperantlingva kvaronjara revuo. Ĝi enmerkatis sin kiel revuo kritike sekvanta okazaĵojn en la moderna kulturo, gazeto eliranta el la “verda geto”, sed ankaŭ esploranta kaj analizanta la historion de la Esperanto-movado. Jam antaŭ la apero de la unua numero la nova gazeto havis centon da abonantoj, el tiuj du trionojn ekster Pollando.”

Legu pli pri ĝi ĉe [https://eo.wikipedia.org/wiki/Spegulo_\(revuo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Spegulo_(revuo))

El Pola Esperantisto, n-ro 29 (5/2007), per la plumo de Tomasz Chmielik (ĉefredaktoro) de la iama Spegulo (la aliaj: Lidia Liĝeża, Kazimierz Leja kaj Stanisław Śmigielski - sekretario de la redakcio):

“SPEGULO estis turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. En estos en ĝi originalaj poemoj, rakontoj kaj teatraĵoj, sed ankaŭ tradukoj el la plej diversaj lingvoj.”

“Multe da atento ni volas turni al la signifoplenaj eventoj kaj aperaĵoj en la arta vivo.”

“Ni deziras, por ke Spegulo estu malferma, sen limigaj antaŭkondiĉoj aŭ tendencoj. Ĉiel ni klopodos, por ke Esperanto fariĝu perilo inter homoj kun diversaj opinioj, kun malsamaj spertoj.”

“Per SPEGULO ni intencas konvinki esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plumamikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn penshorizontojn.”

Mi, Fabricio Valle, prenas kiel miajn la vortojn de Tomasz Chmielik.

LA BEDAŬRINDA ĈESO DE SPEGULO

Milokula Kato, en Ipertinity (<http://www.ipertinity.com/blog/57082/292461>) faris la nekrologon de Spegulo en la 29-a de novembro 2010. El ĝi ni plukis tiujn ĉi vortojn:

“La dumonata revuo Spegulo fondita antaŭ tri jaroj en Pollando ne plu estos eldonata. Tamen... Spegulo estis unu el la tre malmultaj esperantlingvaĵoj kiuj vere pensigis. La triono de Eŭropo travivis gravegajn ŝanĝojn, kaj la antaŭŝanĝa epoko bezonas analizadon.”

Jozefo

Carlos Drummond
de Andrade

*Kaj nune, Jozef?
La festo finiĝis,
la lum' estingiĝis,
popol' malaperis,
vespero frostiĝis.
kaj nune, Jozef?
kaj nun, Joakim?
kaj nune, Rajmundo?
kaj nune, vi mem?
Vi mem, sennomulo,
vi mem, mokemulo,
vi, versofaranto,
amanto, plendanto?
kaj nune, Jozef?
Jen vi, sen edzino,
jen vi, sen dorloto
kaj sen parolado,
jam ne povas plu drinki,
jam ne povas plu fumi,
eĉ sputi ne povas,
jam frostas la nokt',
la tago ne venis,
la tramo ne venis,
ne venis la rido
nek la utopio
sed venis la fin',
kaj ĉio forfuĝis,
kaj ĉio ŝimiĝis,
kaj nune, Jozef?
Kaj nune, Jozef?
Via milda parolo,
viaj febraj momentoj,
manĝegemo kaj fasto,
via biblioteko,
via ora verkemo,
via vintra vestaĵo,
via malkohereco
kaj malamo - kaj nun?
Vi ŝlosilon kunportas
por malfermi la pordon,
sed ne plu estas pordo;
en la mar' volas morti,
sed sekiĝis la mar';
volas iri al Minas,
sed ne plu estas Minas!
Jozefo, kaj nun?
Se vi povus kriegi,
se vi povus ĝemi,
se vi povus ludi
la vian valson,
se vi povus dormi,
se vi povus laci,
se vi povus morti...
Tamen, vi ne mortas,
vi rezistas, Jozef!
Sola en mallumo,
kiel best' sovaĝa,
sen teogonio,
kaj sen muro nuda
por apogi vin,
sen ĉevalo nigra
por fuĝad' galopa,
vi sekvas, Jozef!
Sed, Jozefo, kien?*

KIAL DENOVE SPEGULO?

Unue: kaj nun Esperantujo, sen Spegulo, sen ora verkemo?

Due: ĉar se paroli pri pensigado, la devizo de Heroldo de Esperanto estas “Ni pripensas la mondon”.

Trie: la tuta mondo bolegas kaj travivas profundajn ŝanĝojn: la planeda transiro bezonas analizadon (tio validas por la tuta Heroldo).

Kvare: Fenikso lernis Esperanton.

Spegulo reaperas ne kiel revuo, sed kiel kajero de preskaŭ 100-jara gazeto, kiu ekde nun vivos mirindan aventuron, nome daŭrigi la laboron de la bravuloj, kiuj lanĉis ĝin antaŭ kelkaj jaroj, sed nun la hejtajo estos la tropika suno de Brazilo. Revivigi Spegulon estas rezista iniciato al tiu malfavora situacio:

El la oktobra kajero - jaro 2010 - de la gazeto Ondo de Esperanto:

“...la eldonanto de *Spegulo* decidis ne plu eldoni ĝin en 2011 “ĉefe pro la malgranda nombro da abonantoj...”, kiu “neniam superis centon”.

“Ĝis nun nur 80 personoj diris “jes”... Tro malmulte por plu investi tempon, forton kaj monon. La eldonanto rezignis...”

Siavice en Libera Folio, 2008:

“Malfrue en 2007 aperis famoj, ke *Fonto* trovis mecenaton kaj denove ekaperos en 2008. Tio tamen malveras, rakontas al *Libera Folio* Gersi Alfredo Bays, la iama eldonisto de *Fonto*:

- *Fonto* ne plu renaskiĝos, tiu mecenatado montriĝis trompo. La estonto (jam la estanto) apartenas al interreto. Ankaŭ eldonado de libroj... Oni eldonas ĉiam pli da titoloj, en malplia eldonkvanto.”

Se antaŭ kelkaj jaroj la situacio jam estis malfavora, nuntempe la malfacilaĵoj multobligas. Plej laste, ankaŭ Aleksander Korĵenkov, la eldonanto de la gazeto *La Ondo de Esperanto*, decidis ne plu eldoni ĝin paperan version. Spite ĉiujn malfacilaĵojn kaj argumentojn kontraŭ, ni decidis plu aperigi paperan version de Heroldo de Esperanto. Rezisti estas necese, navigi necesas.

Navigi necesas*

Fernando Pessoa

*Antikvaj navigistoj havis gloran frazon:
“Navigi necesas; vivi ne necesas.”*

*Mi volas por mi la spiriton de tiu ĉi frazo,
forme transformita por akordiĝo kun mia esto:*

*Vivi ne necesas; necesas ja krei.
Mian vivon mi ne intencas ĝui; mi eĉ ne emas ĝin ĝui.
Mi volas nur igi ĝin granda,
eĉ se tiucele mia korpo kaj (mia animo)
nepre estos la brulligno de tiu fajro.*

*Mi volas nur igi ĝin tuthomara;
eĉ se tiucele mi nepre ĝin perdos kiel mian.
Pli kaj pli mi tiel pensas*

*Pli kaj pli mi servas per la anima esenco de
mia sango
la nepersonan celon grandigi la patrujon
kaj kontribui
al la evoluo de la homaro.*

*Jen la formo, kiun ĉe mi alprenis la
mistikismo de nia Raso.*

* “Navigare necesse; vivere non est necesse” (latine): frazo eldirita de Pompeo, romia generalo (106-48 aK) al la navigistoj, kiuj timigite rifuzis vojaĝi dum la milito (laŭ Plutarco en “Vivo de Pompeo”). Ĉi tiu poemo estis tradukita de Gonçalo Neves.

.....

Anonima recenzeto, parolante pri la Romano *Ĉu li?*, en *La Revuo*, jarkolekto de 1908, opinias, ke “la ĉarmo de la verko de D-ro Vallienne oni devas serĉi ne en la temo mem, sed en ĝiaj sennombraj apartaj momentoj”

.....

La du romanoj de Henri Vallienne

Paulo Silas

kontakto@paulosilas.com

LA UNUA ORIGINALA ROMANO EN ESPERANTO

En la unuaj du semajnoj de 2017, mi decidis legi la romanojn de Henri Vallienne, kiuj estas ankaŭ la unuaj du romanoj verkitaj originale en Esperanto.

Henri Vallienne (1854-1908) estas la verkisto kiu, per publikigo de la romanoj *Kastelo de Prelongo* kaj *Ĉu li?*, sinsekve en la jaroj 1907-a kaj 1908-a, unue startigis la radon kiu ĝis nun produktis inter 150 kaj 180 Esperantaj originalaĵojn, laŭ la statistika informo de Sten Johansson, el la artikolo “Jarcento de originalaj romanoj esperantaj”, aperinta en 2007 ĉe *Libera Folio*.

180 verkoj estas ja malmulte, se ni komparas kun la kvantoj de la nacilingvaj literaturaj; sed multe, se ni konsideras, ke temas pri homoj kiuj verkis por malgrandega publiko, kun la seniluzia (aŭ seniluziiganta) konscio, ke apenaŭa rekompenco eblas. La motivoj kiuj decidigas esperantiston verki originalan romanon probable situas en la ĝenerala klopodo kompreni, kial entute oni kreas literaturon. Ĉu pro plezuro? Ĉu kiel provo transdoni mesaĝon? Vesti realan fakton per pli longdaŭra formato? Ĉu por influi homojn? Por amuzi?

Sten Johansson, ankaŭ en tiu artikolo, rimarkigas, ke la rakonto *Urso*, de Henri Sentis, povus forpreni la unuan lokon en la listo de originalaj romanoj. Li konstatas, ke “ĝin oni povus konsideri la unua originala romano en Esperanto, sed ĉar ĝi havas nur 83 paĝojn, tiun honoron oni kutime donas al la 515-paĝa ‘Kastelo de Prelongo’”. Fakte, *Urso* estas nur 56-paĝa rakonto, ĉar la ceterajn paĝojn plenigas poemoj.

Dubindas, ĉu tiu rakonteto de Henri Sentis meritas la titolon “unua originala Esperanta romano”. Sed se unuflanke ĝenas la etamplekso de *Urso*, ne nur paĝokvanta sed ankaŭ enhava, aliflanke ĝenas, ke la profitanto de tiu sentitolo estas la peza kaj malbela romano *Kastelo de Prelongo*. Prefere do, ke ni donu neniun titolon, neniun honoran epiteton, tiel ke ili ĉiuj unuforme apartenu al sama pionira kunteksto. Restu sentitola la rakonteto *Urso*, kies kampa rustikeco ne kongruas kun tia enkabineta kvalifikado. Restu sentitola la rakontego *Kastelo de Prelongo*, ĝuste tial, ke en ĝi titoloj tro impertinenta paŭtis per ekscesa pozo nobela. Kaj ankaŭ sentitola restu, ĉar jam tia ĝi venis al mondo, la malfrue aperinta, kaj por mi daŭre legota, romano *Sen Titolo*, de *Sirjaev*.

ĈU LIGI LA DU HENRI-OJN?

Ĉu la amplekso de la verkoj de Vallienne pozicias lin senkonsteste kiel la unuan originalan Esperantan romaniston? Ĉu oni flankenmetu la malgrandan *Urson* kaj elstarigu la historian rolon de Vallienne? Kion komunan indiki por iel ligi la du pionirajn verkistojn? Ĉu la franceco sufiĉas? Ĉu la antaŭnomo Henri kontentigas? Unu solan plusan ligilon mi trovis: la svisaj Alpoj. Neĝo kaj malvarmo aperas kaj en la romaneto *Urso* kaj en *Ĉu li?*

Post tiu trudita intertuŝo, la dikaj verkoj de Vallienne kune foriras kaj memstare reprezentas la komencon de la Esperanta romanarto. Tio tamen ne signifas indulgon miaflanke.

NE LA TEMO, SED SENNOMBRAJ APARTAJ MOMENTOJ

Anonima recenzeto, parolante pri la Romano *Ĉu li?*, en *La Revuo*, jarkolekto de 1908, opinias, ke “la ĉarmo de la verko de D-ro Vallienne oni devas serĉi ne en la temo mem, sed en ĝiaj sennombraj apartaj momentoj”. Mi etendas ĉi tiun opinion kaj diras, ke vere la temo de la du romanoj de Vallienne valoras nenion. Se vi povas imagi vomigan romantikismon konstruitan surbaze de amintrigoj plej ekstravagance neverŝajnaj, tiam vi alproksimiĝos al la enhavo de la du romanoj. Ĉe ili, nur la duonsurprizaj malnodigoj povas doni reziduan ĝuon al leganto.

LA UNUA ROMANO

Kion celis Vallienne per *Kastelo de Prelongo*? Ekskluzive tempopasigon? Restarigon de perdita moralo? En la provo verki intrigon kiu parolas pri fina triumfo de la “virto” kontraŭ la plej aĉaj hominklinoj, Henri Vallienne sukcesis nur amasigi malbonon sur malbonon, kulpojn sur kulpojn. Tio, kion li penas pentri kiel multkoloran triumfon de altfluga virt-apoteozo, estas panoramo pri socio degradiginta, blinda kaj nekapabla rekonii sian veran malhumanan spegulreflekton.

La unua romano de Vallienne estas laŭŝajne apologio al francaj nobeloj. La verkisto pentras monarkisman socion en sia stertoro. La forto de la nobelituloj suferas atakon. Per la figuro de la protagonistino Matildo, la dekadencia socio mem enkarniĝas. Matildo reprezentas la martiriĝon de nobeloj “maljuste” traktitaj. Eĉ kiam la intrigo volas kredigi, ke virto faras Matildon forta, percepteblas ke ne tio ŝin fortigas, sed ŝia vundita orgojlo de homo tro alta por fali, tro grava por submetiĝi, tro granda por perdi.

Ŝi, lasta vivulo en batalo, insistas lukti kaj insistas pruvi, ke nur ŝi, kaj la socia kasto kiun ŝi enkarnigas, rajtas venki, ĉar nur ŝi, per la rafinito de sia promontora nobeldeveno sukcesas esti virta, bona, grandkora, malprofitema kaj tial supera al ĉiuj diabloj de la malamikaj, frenezaj kaj senskrupulaj subuloj.

.....

La unua romano de Vallienne estas laŭŝajne apologio al francaj nobeloj. La verkisto pentras monarkisman socion en sia stertoro. La forto de la nobelituloj suferas atakon

.....

Henri Vallienne bone plenumas sian decidon relevi glorie la nobelojn kaj stampi, kiel farmisto stampas bruton, krimulan markon sur la servistoj. Eĉ kiam la nobeloj eraras, ili eraras bele, kun mildigaj faktoroj. La eraro de la kastelloĝanta Valentino estas amori kun viro kiu ne estas ŝia laŭleĝa edzo. La eraro de la nobela Matildo kaj ŝiaj gepatroj estas repuŝi per impertinentaj vortoj la malbonintencan svatiĝanton. Tamen Viktoro, la lakeo-filo, la svatiĝanto, la senskrupula subulo, eraras per murdoplanoj. Se nobelo eliras dumnokte kaj driblas malpermesojn, tion li faras motivita de reciproka amo (Frederiko kaj Valentino). Sed piedoj de preparenco de lakeo driblas malpermesojn nur por trudi sekskuniĝon (Viktoro kaj Matildo). Vallienne kreis protagonistojn, kiuj igas la leganton kredi, ke la bono rezidas ĉe la nobeloj, dum la perfido ĉe la malnobelaj (kaj malnobelaj!) lakeoj, kiuj konspiras postdorse por korupti la purecon de jarcenta dinastio.

Por Vallienne, la noblaj servistoj estas nur la servistoj plene submetiĝintaj, nur la homoj kiuj montras enorman ĝojon esti subuloj de nobelaj bonuloj. Ilia servista vivsignifado resumiĝas al tio: servi ĝis maljunaĝo fidele siajn superulojn, kun eĉ laŭvola preteco donaci altruisme siajn ŝparaĵojn al riĉaj mastroj kiuj decidis efektiviĝi kapricojn en anonima aventuro (p. 677).

Senpudora estas la rimedo kiun Vallienne alproprigis kiel providencan helpon al Valentino. Por glorigi la malriĉiĝintan nobelinon, preskaŭ tute senheredigintan de sia malbona onklino, la ĉiela dio (tio estas la verkisto, kiu per sia ĉioscia plumo kreas universon) aranĝis ĉiujn cirkonstancojn por sendi ŝin tute paralizita al drivado sur boato, kaj atingi alikontinentan havenon, kun senprecedenca bonŝanco. Sur tiu eta navigilo, oni-ne-scias-kiele ŝi postvivis uraganon kiu minutojn antaŭe estis detruinta apudmaran rokan groton kiu ekzistis “de multaj miloj da jaroj” (p. 370) kaj kiu trenis kun si la domon kie ŝi ripozis post akuŝo okazinta antaŭ horoj. Amerikaj, tio estas usonaj, maristoj trovas ŝin, portas ŝin al Nov-Jorko kaj tie ŝi ricevas la gracon fariĝi filino de milionulo. Por kompletigi la miraklon, la maljuna usonano mortas tagojn post ŝia filiniĝo, ne sen tamen havi tempon testamenti ĉion al la francino. Evidente ŝi estas tiom virta, ke, en estonta sceno, amplene ŝi konfesas, ke

Dum hodiaŭ mi estas premegega de tiu supermegega riĉaĵaro, kiu ne povas min utili: ĝi alvenas en la momento kiam mi ne ĝin bezonas plu. Mia kara Matildo, se vi mem ne estus tiel riĉa, mi ĝin donus al vi ĝojege, petante de vi interŝanĝe nur la forgeson de l' estinteco kaj samtempe malgrandan lokon en via domo kaj en via koro. (p. 654-655)

SIMILECO INTER LA UNUA KAJ LA DUA ROMANO

La romano *Ĉu li?* aperis post mallongega interspaco rilate al *Kastelo de Prelongo*. Se Henri Vallienne estus havinta la oportunon esti esperantisto dum pli longa tempo (li esperantistiĝis en 1903 kaj mortis en 1908), probable ni disponus pli grandan verkaron. Tiam ni povus kompari liajn unuajn romanojn kun la lastaj. Okazas do tial, ke la romanoj *Kastelo de Prelongo* kaj *Ĉu li?* kunmiksiĝas. Ili havas pli da simileco ol da diferenco.

En la du romanoj (1) geamantoj uzas, por sekreta amorado, kaŝitan pordon kiu ligas dormoĉambrojn; (2) virino fariĝas, post edziniĝo, posedajo kiun edzo disponas. Amorado estas rajto kiun la edzino ne povas rifuzi kaj kiun la edzo trudus, se necese. “En la geedziĝo la perforto ne ekzistas” (*Kastelo de Prelongo*, p. 500); (3) virinoj martiriĝas, kun sansituacio kiu randas morton, kaŭze de agado de viro(j); (4) la intrigo okazas en Francio (ne hazarde, se ni memoras la naciecon de la verkisto); (5) la intrigo akiras internacian amplekson. En *Kastelo de Prelongo* temas pli pri flanka etendo, sen grandaj sekvoj, sed en *Ĉu li?* la internaciaj okazaĵoj aperas pli ofte. Plejparte la verkisto ne priskribas realtempe kio okazas en iu fremda lando. Ĉiam temas pri nereka scio pri pasinta tempo kiun iuj el la protagonistoj rememoras. Escepto estas la iro de Reĝino al Svisio, ĉe la romano *Ĉu li?*; (6) iu protagonisto saviĝas per boatdrivado sur oceano, kun alveno al malproksimaj destinoj: de Francio al Usono, en *Kastelo de Prelongo*; kaj de Francio al Aŭstralio, en *Ĉu li?*; (7) la verkisto priskribas dialogojn tiel afektemajn, ke eblas demandi kie li ĉerpis tian supraĵecon. La respondo kredigus, ke aŭ rekte el nobeleca societa parado kiun la romanisto volis krei (*Kastelo de Prelongo*) aŭ en nostalgio, flanke de la verkisto, al etiketo de kortego ne plu ekzistanta (*Ĉu li?*); (8) prezentiĝas konflikto inter leĝaj devigoj kaj faktaj cirkonstancoj. “Ni troviĝas antaŭ du moraloj, la natura kaj la nenatura. Nu, mi ne ŝanceliĝas; mi elektas la laŭnaturan moralon, kaj tre malproksimen forĵetas la moralon nur arte faritan” (*Ĉu li?*, p. 603) kaj (9) okazas sinmortigoprovoj per engluto de veneno. Neniuj provoj sukcesis.

ESPERANTO

La ĉefa diferenco kiun mi trovis inter la du romanoj de Vallienne estas la (ne)ĉeesto de Esperanto. En *Kastelo de Prelongo*, neniuj el la roluloj estas esperantistoj. Esperanto neniam aperas en la romano, eĉ ne kiel malrekta citaĵo. Envere estus eraro, se Esperanto aperus, ĉar la tuta rakonto okazas dum monarkia Francio, en periodo antaŭa al la publikigo de la *Unua Libro*. Alimaniere, la intrigo de *Ĉu li?* okazas ĉefe dum komenco de la 20-a jarcento, precipe en la 1900-aj jaroj. La radiko Esperant-, kun majusklo, t.e., kun rilato al la lingvo, aperas 16 fojojn en la romano *Ĉu li*, ĉar du el la protagonistoj estas esperantistoj. Unu el ili estas eĉ kunfondinto de “Pariza Esperanta grupo”.

LEGINDECO

Motivon por legi la romanojn de Vallienne? Historio. La du verkoj de Vallienne estas la unuaj seriozaj provoj krei originalajn romanojn. Krome, Ĉu li? ankaŭ povas doni al la leganto iom da ĝuo. Eĉ se la fino de la romano pli-malpli jam diveneblas, la klimakso, kiun konsistigas la renkonto de la du ĉefaj protagonistoj, tiklas la leganton. Kio do okazos poste? - oni sin demandas.

P.S.: La du romanoj estas elĉerpitaj en papera formato. La bita versio, laŭ eldono de Inko, kiu legeblas senpage en interreto, estas la referencoj de tiu ĉi artikolo.

1 AME: postmorta serio de Gilbert Ledon

El la redakcio

Gilbert Ledon (1931 - 2003) (<http://bit.ly/GilbertLedon>) estis vigla aktivulo de la E-movado kaj aparte de SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda. Kiam en la 1990-jaroj Fabrício Valle agadis per sia unua eldonejo, nome Zamenhof Editores, Ledon estis unu el ties plej viglaj subtenantoj.

Nu, la ideoj de la franca anarkiisto, kiu edziĝis kun brazilano, estas ofte polemikaj, sed neniu povas aserti, ke li ne pripensis funde la mondajn problemojn kaj klopodis prezenti vojojn. Ĉar la devizo de *Heroldo de Esperanto* estas "Ni pripensas la mondon", ni prezentos al niaj legantoj serion da dudek du artikoloj el kiuj konsistas la libro (neeldonita) de unu el la plej instigaj E-pensuloj. Kiel ordinare, la ideoj de niaj kunlaborantoj (ankaŭ de la forpasintaj) ne nepre estas la opinio de *Heroldo*. Ni simple volas omaĝi samideanon kun interesaj kaj pensinstigaj ideoj. Ni esperas, ke la tuta serio plaĉu al niaj legantoj kaj stimulu debaton.

Lilia Ledon, lia filino, transkribis la manuskriptojn en aŭgusto 2016. Sekvas ŝiaj informoj kaj poste "Avertoj al la legantoj", de la aŭtoro mem.

KELKAJ INFORMOJ DE LA TRANSSKRIBINTO

Gilbert R. Ledon forpasis en 2003 kaj postlasis ĉi tiun verkon, kiun li intencis publikigi en la sama jaro, ankaŭ en la portugala kaj en la franca. La manuskripto konsistas el tri notblokoj manskribitaj. Mi respektas ĝian sinksevon (kiu eble ne estis la definitiva kaj kiun mi mem numeris) kaj enhavon (eĉ dum li vivis ne utilis ĉiel ajn provi prudentigi lin rilate ion ajn) kaj enkondukas nur punktajn kaj neprajn modifojn (laŭ miaj E-konoj) kaj enhavtabelon.

Permesu personan rimarkigon: la aperigo de ĉi tiu skribaĵo malfruas je 15 jaroj sed malmulton la aŭtoro ŝanĝus se tian eblecon li havus. En la lasta parto li intencis reeldoni tekston verkitan en 1956 (ne retrovitan), kie jam enestis liaj ĉefaj (kaj, laŭ li, pravaj kaj personaj, konsciaj kaj nekonformistaj) "ideoj", tiaj, kiaj ili nun ĉi tie legeblas. Ŝajne "vivos-pertoj" kaj "eksperimentoj" ne nepre ŝanĝas



Vladvitek

AME - Alia mondo eblas

starpunktojn ĉar ĉiu ilin interpretas laŭ sia vidpunkto. Jes, *Alia Mondo Eblas* (ties siglo estas AME, laŭ la eltrovo de Ledon mem); jes, ĝi eblas sed ne pere de propravola ŝanĝiĝo de la homoj, tio estas ekster eĉ iliaj "homaj, raciaj, konsciaj, kleraj kapabloj" (malfacile tiel taksu kapablojn kun objektiveco; krome, ĝuste tiaj supozaj kapabloj kondukis la homojn al la nuna katastrofa planed-stato); ĝi eblas kiam transcenda energio AME enkondukos am-, do viv-mutacion ĉe la homaro.

AVERTO AL LA LEGANTOJ

Vi enmane tenas nekonformisman eseon pro la esenco de la temo, kiu celas prezenti "alian mondon", do iun mondon, kiu ne obeas al la ĝisnunaj kutimoj, tradicioj, akiritaj moroj aŭ sistemoj. Iu mondo, kiu ne bezonas dion, nek ŝtaton. Iu mondo, kie bedaŭrinde oni konstatas ke la 2000-jara homa ĝisnuna kristana civilizacio estis sub la ŝildo de la homa stulteco, kretenco, malklereco kaj obskurantismoj. Tiel, se vi sincere ankoraŭ pensas ke la homo estas vere supera ento, ke la stultulo kaj kreteno estas mi, bonvolu ne ofendiĝi... sed evidente ne legu la por vi malrespektaman sekvon de ĉi tiu libro.

Multaj sociaj kritikoj, faktoj, jam estis analizitaj en miaj antaŭe eldonitaj verkoj: *Satana Anĝelo; Moderna mito: la kolektiveco; Al la tero returne; Anarkia konstruo; Sennaciece tra nia mondo*.

En la venonta numero: Konceptoj pri alia mondo ebla

SERIO - MEMORINDAJ ESPERANTISTOJ 1

Domènec Masachs, la pacisto kiu provis murdi diktatoron

Xavi Alcalde

Inter la plej memorindaj kaj tamen malpli konataj esperantistoj brilas propralume Domènec Masachs Torrente (1891-1965). Modesta kaj laborema, li loĝis en proleta kvartalo de Barcelono. Kuraĝa kaj kulturema, li ĉefrolis en multnombraj sociaj kaj politikaj aventuroj. Juna idealisto li estis kaj restis dum sia tuta vivo.

Ankoraŭ infano, li eklaboris en grafika metiejo. Samtempe, li aniĝis al progresemaj asocioj, kiel la Moderna Lernejo de Francisco Ferrer i Guàrdia kaj la Liber-pensula Asocio. Kun anarkiistoj li amiĝis kaj partoprenis ilian lukton por plibonigi la labor- kaj vivkondiĉojn de la laboristoj. Tiu agado kuntrenis suferojn. Ekzemple, li estis dufoje maldungita: en 1902 pro sia apogado al la ĝenerala striko, kaj en 1919 pro la fama striko de La Canadencia, kiu sukcese atingis revolucion koncedon de la hispana registaro, nome la 8-horan labortagon. Sekve, Hispanio fariĝis la unua okcident-eŭropa lando preninta tian decidon. Endas diri ankaŭ ke Domènec Masachs ekkonis malliberejon en la jaro 1920.

En 1923 Hispanio iĝis diktaturo sub la generalo Miguel Primo de Rivera, inspirita de la faŝisma modelo de Mussolini. Elkarcerigite komence de 1926, Masachs decidis daŭrigi sian socian lukton per neatendita agmaniero: li murdos la diktatoron. Eblas imagi grandan batalon ene de lia kapo, ĉar li estis kaj pacisto kaj idealisto, kiu ne kapablis toleri tian reĝimon. Li decidis fari ion ekstreman, radikalan, preskaŭ frenezan, sed ankaŭ koheran kun sia pensmaniero. Tre gravis por li, ke ne estos senkulpaj viktimoj. Pro tio, li decidis agi sola, ja brave, sed eble ankaŭ naive. Ponardon li aĉetis kaj sian planon li detale preparis.

La 31-an de julio la diktatoro devis ĉeesti ceremonion en Barcelono. Masachs atente esploris la itineron de la

ŝtatestro kaj elektis la plej taŭgan momenton por agi. Kiam la tago alvenis, jen li pretis sin oferi por la demokratio. Tamen, ne vidante ĉion klare surloke, li decidis atendi pli bonan okazon. Kiam la procesio alproksimiĝis al la stacidomo, kie la diktatoro devis enrajniĝi al Madrido, Masachs rapide piediris ĝis la oficiala aŭtomobilo. Forpuŝinte policiston, li provis eniri la aŭton kun sia ponardo enmane, sed mallerte ekglitis pro la ŝtupareto de la veturilo. Ĵetante la ponardon ene de la aŭto, li ne sukcesis vundi iun ajn. Tiumomente alia policisto batis lin surkape kaj senkonsciigis lin. Kaj dua aŭto alveturis kolizie, frakasante du-loke lian dekstran kruron.

Kompreneble, tiu anekdoto aperis en ĉiuj ĵurnaloj. Tamen, la diktatoro malpermesis informi pri la juĝproceso. Tio Masachs publike konfirmis, ke li ja intencis murdi la ŝtatestron. En malliberejo, gravaj anarkiistoj, subtenantoj de kolektiva agado, ne nur malvarme lin ricevis sed ankaŭ mokis lin. Bonŝance, la diktaturo finiĝis en 1930 kaj, dank' al amnestio, Masachs estis denove libera unu jaron poste. Kaj denove aktiva. En 1933 li fasto-strikis tri tagojn solidare kun simila protesto, kiun Gandhi faradis en Barato kontraŭ la brita imperiismo. Tiuepoke Masachs denove sindikatanis kaj pro tio li denove sidis en malliberejo. Ĉi-foje regis Hispanion alia diktatoro: Francisco Franco.

Liberigite, li ekinstruis Esperanton en asocioj ankoraŭ hodiaŭ ekzistantaj, kiel "Paco kaj Amo" en la kvartalo Gràcia aŭ la Klubo de Amikoj de UNESKO. Unu lia lernanto rakontis membiografie, ke Masachs ĉiam deklaris sin kontraŭ ĉia perforto kaj abomenis armilojn, kiuj kapablas kazi viktimojn. "Neniu senkulpa viktimo kaj neniu pistolo", li diris. Jen siamaniere kohera homo, profunde humanisma kaj kapabla agi el propra iniciativo, sen timo al la reganta opinio. Ĉu eble tipa samideano?

En la venonta numero: Alice Herz (1882-1965)

Kiel konduki la E-mondon?

Etsuo Miyoshi

La usona filozofo Thomas Pogge asertis, ke se paroli pri la maljusta angla dominado en la mondo, alpuŝi la anglan lingvon ekvalentas al murdo kaj ŝtelado, uzurpado de la rajtoj de la alilingvaj landoj. Tio devas esti urĝega temo pri reformoj en la nuna mondo.

Philippe Van Parijs, belga filozofo kaj politika ekonomikisto, diris, ke nur la denaskaj parolantoj de la angla estas kompletaj kaj tio kreas maljustan mondon. Aliflanke, almenaŭ duono el la anglalandoj devas pagi la kostojn por lernigi la anglan al neanglalingvanoj.

La kanada politika filozofo Will Kymlicka opinias, ke la disvolvado de Eŭropa Unio iom post iom limiĝas pro la anglalingva elito. Estas granda risko pri neniĝo de la demokratio bazo, se oni ne diskutas pri socio, ekonomio kaj aliaj gravaj aferoj, inkluzive de decidoj de aliaj, per ĉiutaga lingvo.

Laŭ Robert Henry Lawrence Phillipson, brita lingvisto vivanta en Danio, forlasin-

te siajn koloniojn, Anglio kaj Usono plu profitis per politiko kaj komerco, kio rezultis en altrudo de regado de la angla lingvo per nacia strategio! Ekzemple en 1993, pro financaj kondiĉoj de Internacia Monda Fonduso (IMF) oni devis ŝanĝi en afrikaj landoj la edukadon per la svahila al la angla lingvo.

Diversaj gravuloj jam konscias, ke la angla dominado ne bonas, tial necesas strategio por trafe kontraŭstari la nunan situacion. Bonŝance E-mortintoj lasis heredaĵon al UEA por la diskonigo de nia internacia lingvo! Ni respektu ilian volon. Ŝanco por esti aŭskultitaj ekzistas. Ni povas aperiĝi nacilingve 10-foje la saman tutpaĝan anoncon en la plej prestiĝaj ĵurnaloj en ĉiu EU-lando. Tio estos



Eŭropa Parlamento en Bruselo

Artjazz

ja vetado, sed se oni ne vetas, nenia renversigo okazos.

Plie, ni memoru, ke en 1955 UEA translokiĝis al la havenurbo Roterdamo. Ĉu ne venis jam tempo nin demandi, ĉu efektive

tiu havenurbo estas la plej ĝusta loko por la sidejo de UEA? Bruselo estas la fakta ĉefurbo de EU. Ĝi estas efektive la plej trafa loko por lobiado ĉe diversaj politikaj instancoj de EU kaj ankaŭ ĉe NROj. Por profiti je tio, ne sufiĉas nur kelkfoja vizito al Bruselo, sed daŭre restadi tie kaj forte aktivi en la ĝusta loko. Ebloj por renversigo de la monda ordo ekzistas kiel supre dirite, aŭ ĉu ni ĉiuj senesperigis kaj agas kiel hobiistoj?

Se konsideri nian nunan forton, sufiĉus malgranda oficejo kun minimuma stabo: direktoro kaj sekretario. La aliajn servojn de UEA oni translokigu al landoj, kies kostoj estas konsiderinde pli malaltaj, se paroli ekzemple pri minimuma salajro, poŝtaj tarifoj kaj vivkostoj ĝenerale.

Aĉeto de plia domo en Roterdamo definitive enradikigos nian asocion UEA tie kaj malfaciligos aliajn opciojn estonte. Nun estas decida tempo por Bruselo kaj por bona utiligo de nia mono! Ni kune realigu la ludovikan revon... aŭ ĉu dormigi la monon en banko estas pli saĝe?



Scienca Heroldo

Amri Wandel,
IKU-sekretario kaj prezidanto de AIS

2016 en retrospektivo: Esperanto kaj scienco

Internacia Kongresa Universitato kaj Internacia Akademio de la Sciencoj San Marino 124-paĝa

Mi decidis akcepti la taskon fariĝi prezidanto de AIS provizore, sen publika anonco, ĝis la UK, kaj tiam decidi ĉu mi daŭrigos oficiale kiel prezidanto aŭ rezignos. Mia unua paŝo por revivigi AIS estis denove okazigi la Premion Pirlot, por la plej bona scienca libro de la jaro. La lastan fojon tiu konkurso okazis en 2001, kiam gajnis la premion mia libro *La Kosmo kaj Ni*, kunverkita kun David Galadi Enriquez. Sed mi havis pli grandan planon ol nur reokazigi la konkurson. Kial konkurencu nur sciencaj libroj? Ne aperas multaj sciencaj libroj en Esperanto. Mi decidis plivastigi la premion al tri kromaj kategorioj: sciencaj artikoloj, prelegoj kaj reta kurso. Mi cetere proponis aljuĝi en ĉiu branĉo tri premiojn, kiel en la belartaj konkursoj de UEA. Kaj laste, ĉar la premio ne estis aljuĝita dum dekkvin jaroj, konsideri verkojn ne nur de la lasta jaro, sed de la lastaj kvin, por doni ŝancon al pli da verkoj. Mi reverkis la Pirlot-regularon kaj post kiam la AIS-senato benis la ŝanĝojn, ni anoncis la konkurson en Esperantujo. La renovigita konkurso vekis intereson kaj iom post iom komencis alveni proponoj. Entute venis 28 proponoj, kiujn la juĝkomisiono por Premio Pirlot konsideris kaj prijuĝis. La premioj estis disdonitaj dum la UK en Nitra. En la branĉo - reta kurso - ne estis aljuĝita pro manko de konkurenco. La rezultoj videblas en la AIS-retejo, <http://www.ais-sanmarino.org>.

SCIENCAJ LIBROJ

Ne aperas multaj sciencaj libroj en Esperanto

La IKU-komisiono, post profesia prijuĝo de la alvenintaj IKU-proponoj, faris rekomendon por IKU kaj Scienca Kafejo en Nitra. Pli ol monaton antaŭ la kongreso jam estis videblaj en la IKU-paĝo la resumoj de la IKU-prelegoj kaj de la Scienca Kafejo: <http://uea.org/kongresoj/universitato>. La IKU-prelegoj kaj la aliaj sciencaj programeroj estis anoncigitaj ankaŭ per Gazetara Komuniko kaj en artikolo kiun mi verkis en la maja n-ro de *Esperanto*.

Kvankam la UK de Nitro ne estis inter la plej grandaj, ĝi verŝajne havis pli riĉan kaj varian sciencajn programon ol iu antaŭa UK. Krom la tradicia IKU-sesio okazis ankaŭ la novaj programeroj "Scienca Forumo" kaj "Scienca Kafejo". Mi faris specialan prelegon pri la malkovro de gravitaj ondoj.

La 60-a sesio de IKU

La 69-a sesio de IKU estis abunde vizitata, kaj prezentis riĉan oferton. Same riĉa estis la 124-paĝa IKU-libro, kiu havis tute novan aspekton: unuafoje ĝi estis koline ilustrita, libroforme bindita kaj enhavis aldona al la naŭ IKU-tekstoj ankaŭ la resumojn de la prelegoj prezentitaj en la Scienca Kafejo.

Enhava la IKU-prelegoj estis tre variaj. Du el la tri AIS-IKU-kursoj (komuna sesio inter IKU kaj Akademio Internacia de la Sciencoj) rilatis al la kongresa temo, traktante lingvan justecon: Bengt-Arne Wicksström prelegis pri "Optimumaj minoritataj rajtoj kaj ilia realigo" kaj Javier Alcalde pri "Naŭ demandoj pri lingva justeco en la fakliteraturo". Mi mem prezentis la trian AIS-kurson, pri "Astrobiologio kaj vivo en nia kaj aliaj sunsistemoj". Efektive mi prelegis dum IKU ankaŭ pri alia astronomia temo (anstataŭ Prof. Maitzen, kiu malsaniĝis kaj ne povis veni al Nitro) - "Ĉu Zamenhof kaj

Esperanto povas endanĝerigi la Teron?" - temis kompreneble pri la asteroidoj kun tiuj nomoj. Fine de la du IKU/AIS kursoj de Alcalde kaj Wandel okazis AIS-ekzamenoj, en kiuj partoprenis senprecedenca nombro de pli ol 60 personoj.

Unuafoje okazis la Scienca Forumo - nova publika kunveno, kiun partoprenis la sciencaj organizaĵoj kaj agantoj cele al estonta kunlaboro. Partoprenis reprezentantoj de kvin sciencaj institucioj kaj organizaĵoj - AIS, UEA/IKU, ISAE/Scienca Revuo, STEB kaj KAEST kaj publiko de preskaŭ cent personoj. Aparte oni diskutis la kunlaboron inter AIS, ISAE kaj UEA (kun kiu AIS jam kunlaboras kadre de la komunaj AIS-IKU sesioj, kiuj okazas regule ekde 1995). Rekomendojn pri la estonta kunlaboro kun UEA kaj kun ISAE kaj aliaj sciencaj E-instancoj oni faris ankaŭ en la AIS-senato, kiu kunsidis en Nitra (unuafoje post 2001 dum la UK).

librandify



Diagonale

Giorgio Silfer

Brexit: kiuj sekvoj por la lingvopolitiko de EU?

La britaj popoloj referendumis en junio 2016 pri la demando "To be or not to be in Europe?". Se la hamleta dubo solviĝus negative, tio egalus al sinmortigo, laŭ eŭropistoj; aŭ tute male, laŭ sendependistoj.

Preskaŭ neniu pensis pri la lingvaj sekvoj de la secesio. Se Britio elirus el Eŭropa Unio, ĉu

ŝanĝiĝus la statuso de la angla?

Certe la angla daŭras kiel oficiala lingvo de NATO, kaj ankaŭ de Konsilio de Eŭropo (kune kun la franca kaj la idiomo de la laŭvica prezidanto). Sed ĝia pozicio malfortiĝos en EU, precipe en la plej babelaj el ĉiuj institucioj, nome la Parlamento. Demando estas: ĝis kioma grado?

Ekzistas konsekvencoj praktikaj kaj konsekvencoj juraj.

Kiam Britio ne plu estos membroŝtato, ĝi ne plu havos EU-parlamentanojn. Tio signifas ke neniu deputito parolos denaske la anglan, krom eventuale maltanoj kaj irlandanoj. De la nunaj naŭdek, la anglaj denaskuloj iĝos maksimume dek sep; se hodiaŭ ili estas dek du procentoj de la parlamentanoj, morgaŭ ili estos nur du procentoj: pli nombraj nur ol la denaske parolantaj la leceburlingvan, verŝajne. Do la unua praktika konsekvenco estos la preskaŭa malapero de politikistoj (deputitoj kaj funkciuloj) denaske anglalingvaj.

Kontraŭe, enorme kreskos la proporcio de la german- kaj francparolantoj. Kun la subteno de la situo en precipe franclingvaj medioj (Strasburgo, Luksemburgo, Bruselo). Praktike, ni revenos al situacio simila al 1973, kun la franca (kaj la germana) pli parolataj ol la ceteraj lingvoj.

Estas malprobable, ke la angla gardos efikan rolon de vehikla lingvo. Eŭropa Unio povus simili al granda Svislando, kie gravas la germana kaj la franca, agrable minoritatas la itala kaj marĝenas la retoromanĉa (kaj la ceteraj idiomoj, parolataj de la enmigrintaj komunumoj). Kompreneble ankaŭ la angla estas lernata, eĉ tre lernata en Svislando; sed neniu uzas ĝin kiel vehiklan inter la diverslingvaj kantonoj.

Mia kolego Michele Gazzola, multe pli sperta ol mi pri lingva ekonomiko, povus konfirmi ke la posedo de la angla ne kondukos plu al pli grandaj enspezoj salajraj, dum fariĝos pli avantaĝa por la funkciula kariero la scipovo de la franca kaj germana.

Por la juraj konsekvencoj necesas referenci al du fundamentaj dokumentoj. La unua el ili estas la reglamento de 1958 pri la lingvoreĝimo. Ĝi normigas la multlingvismon tiel ke, ŝajne sed ne tute certe, neniu membroŝtato povas indiki pli ol unu oficialan lingvon. Tial ke Irlando elektis la gaelan kaj Malto la maltan, neniu sponsorus la anglan.

La dua dokumento estas la Konstitucia Traktato, specife ĝia artikolo 342. Citante ĝin, la prezidantino de la Komisiono pri konstituciaj aferoj de la EU-parlamento, s-ino Danuta Hübner, deklaris: La angla estas unu el la dudek kvar oficialaj EU-lingvoj ĉar Britio identigas ĝin kiel sian propran oficialan lingvon. Sed tuj kiam Britio estos plenuminta la procezon de forlaso de EU, la angla povus perdi sian statuson. Se ni ne havas Brition, ni ne havas la anglan.

Laŭ la restriktita interpreto kiun ŝi donis, la angla malaperos en la oficialaj EU-dokumentoj, ekde certa dato. Des pli ke, pri la angla idiomo uzata hodiaŭ en Bruselo, jam cirkulas ironiaj pamfletoj. En la EU-dialekto de la angla, ekzemple, "actual" signifas "aktuala" (anstataŭ

"efektiva, reala, ekzistanta") -- oni devus diri "current"; aŭ por garantii servojn oni skribas "to ensure" anstataŭ "to provide". Kaj tiel plu: se tiel estas jam nun, kun anglalingvaj denaskuloj en la tradukaj servoj, kio okazos morgaŭ, kiam ne plu eblos dungi britajn ŝtatanajn?

S-ino Hübner indikis teoriantan solvon, por garantii la plueston de la angla: unuanima (sed nur unuanima) decido de la dudek ses restintaj membroŝtatoj (tra la Eŭropa Konsilio) favora al la reteno de la angla kiel oficiala lingvo. Dubinde ke tio sukcesos.

Ĉu la brita secesio povus favori la proponon pri esperanto kiel vehikla lingvo?

La Eŭropa Parlamento jam diskutis pri esperanto, en marto-aprilo 2004. La tiama propono de la itala deputito Gianfranco Dell'Alba, de la radikala partio, celis enkonduki esperanton kiel pontolingvon por la interpretado. La sama komisiono prezidata nuntempe de s-ino Hübner malaprobis la proponon, per dek tri voĉoj

kontraŭ dek du: decida estis la voĉo de germana kristandemokrato. La klopodo reenmeti la proponon kiel amendon al la komisiona raporto estis ankaŭ rifuzita de la pleno, denove kun minimuma diferenco. Kun esceptoj ambaŭflanke, favore al esperanto sin esprimis la maldekstro, kaj kontraŭe la dekstro. Tuj post la lasta voĉdonado, la tiama Konsulo de la Esperanta Civito kune kun mi havis aŭdiencon kun la radikalaj italaj parlamentanoj. Ilia klarigo estas, ke la Parlamento komprenas la valoron de esperanto, se ĝi kupliĝas al la demando de la defendo de la minoritatoj, kaj se la minoritatoj mem komprenas tiun kupliĝon.

Mia persona inklino samopinias nur parte. Ekzistas ankaŭ psikologia faktoro kiu meritas atenton. Kiam evidentiĝis la risko, ke la germana marko fariĝos la eŭropa valuto, tiam Francio preferis alternativan, "arterfaritan" solvon: eŭro. Se morgaŭ evidentiĝus la risko, ke la germana fariĝos la dominanta oficiala lingvo de Eŭropa Unio, Francio povus proponi eĉ esperanton. La saman timon, la saman forrifuzon verŝajne vekas nek la usona dolaro nek la angla lingvo.

Sed danke al la rezulto de la brita referendumo multo povas evolui. Ni estas nur en la komenco de la partio. Partio, kiu havas pli gravajn geopolitikajn defiojn ol la lingvaj. Certe ne konvenas al Eŭropo resti en la situacio de julio 1940, kun akso kiu de Madrido (kaj eĉ Lisbono), pasante tra Parizo (fakte Vichy) atingas Romon kaj Berlinon, kaj supren ĝis Helsinko kaj suben laŭ la Danubo (kaj kun Irlando neŭtrala); sed kun la anglosaksaj potencoj ekstere. Ĉi-foje ne okazas milito, nur divorco. Sed kiun lingvon vi ŝatas paroli, post divorco el angl(in)o?

Preskaŭ neniu pensis pri la lingvaj sekvoj de la secesio. Se Britio elirus el Eŭropa Unio, ĉu ŝanĝiĝus la statuso de la angla?

Abonu Heroldon

www.heroldodeesperanto.com/abonilo

Lingvio

La mondo de la lingvoj

Interlingvistiko Poliglota Movado Novbabelismo Lingva politiko
 Historio de la lingvoj Ekonomio de la lingvoj
 Lingvo-teoriistoj Lingvaj rajtoj Esperantologio
 Lingvo-instruado Historio de Esperanto
 Lingvaj problemoj Lingva diskriminacio Lingvo-kulturo
 Lingvaj minoritatoj



INTERVJUO | GIRIDHAR RAO

Historiaj lingvaj diskriminacioj en Barato

Giridhar RAO gvidas en la Universitato Azim Premji (Bengaluro, Barato) kursojn pri lingva politiko, multlingva edukado, sciencfikcio, Esperanto kaj lingva demokratio. Li estas aŭtoro de pluraj eldonaĵoj en la angla kaj en Esperanto pri multlingvismo kaj pri edukaj politikoj por lingvaj malplimulto. Li blogas sporade pri tiuj ĉi temoj ĉe ipernity.com/blog/giridhar.

Massimo Ripani

massimo.ripani@heroldodeesperanto.com

MR: Kiuj estas nun la plej fortaj kaj uzataj lingvoj en Barato?

GR: Estas 22 "oficialaj lingvoj" en Barato (plus la angla kiel "akompananta oficiala lingvo"). La denaskaj parolantoj de tiuj ĉi 22 lingvoj konsistigas pli ol 95% de la loĝantaro. La hindia (41%), bengala (8%), telugua (7%), maratha (7%), tamila (6%), kaj la urdua (5%) estas lingvoj kun la plej granda nombro de denaskaj parolantoj².

Tion dirite, oni notu, ke la lingvonomo hindia fakte enhavas gamon da pli-malpli interkompreneblaj variaĵoj aŭ dialektoj — efektive 50 da³ Ĉiujn oni metas sub la rubriko de la hindia. Same okazas je malgranda skalo ĉe la aliaj oficialaj lingvoj.

Krom ĉio ĉi estas la angla. Gravaj ĝi ne pro siaj denaskaj parolantoj (nur 0,022%), sed pro sia historia (t. e. kolonia) kaj aktuala roloj en la aferoj de lando. Ĝi estas la lingvo de la superaj niveloj de la burokratio kaj jursistemo; unu el la oficialaj lingvoj de la nacia parlamento; kaj plejparte la lingvo de supera edukado en la lando. Krome, niaj avantaĝoj en la tutmondiĝanta ekonomio (kompare al Ĉinujo, ekzemple) dependas ĉefe de la nombro de anglaparolantoj en Barato.

Nesurprize do, la angla estas neproporcie forta lingvo en Barato, kiu plurnivele kaj diversmaniere malstabiligas la lingvan ekologion en la lando.

MR: "Barata politikisto, Jitendra Singh, diris, ke la hindia lingvo devas esti multe pli antaŭenigata en la lando, speciale en suda kaj nordorienta Barato. Li aldonis,

ke la hindia, iĝante rimedo de komunikado trans la lando, povus helpi la junulojn en la kandidatigo por laborpostenoj."⁴ Ĉu vi povas komenti tiun aserton?"

GR: Jam de jardekoj en Barato, oni proponis kaj rezistis provojn fari la hindian lingvon "nacia lingvo". Sed kiel mi diris antaŭe estas ĉirkaŭ 50 variaĵoj de la hindia mem. Malfacilas do diri pri kiu "hindia" oni parolas!

Sed la hindia ne estas la sola regiona lingvo kiu provas trudi sin sur aliaj lingvokomunumoj. Ĉiuj el niaj oficialaj lingvoj provas fari ĝuste tion. Tio plej videblas en la edukistemo. Por minimume 20-25% de infanoj, la lerneja instrulingvo malsamas al la hejma lingvo⁵.

Plej grave suferas pro tio la infanoj de la indiĝenaj komunumoj en Barato. Alfrontas ilin, aldone al la kutimaj bariloj por la malriĉularo, ankaŭ lingva barilo. Preskaŭ neniam la hejmlingvo estas la lerneja instrulingvo.

Nesurprize, el ĉiuj 100 indiĝenaj infanoj kiuj eniras la edukistemon, ĉirkaŭ 35 lasas ĝin jam dum la unuaj kvin jaroj. Dum la postaj kvin jaroj, 35 pli estas elpuŝitaj. Tiel, nur 30 restas post 10 jaroj da lerneja edukado⁶. Gepatralingve bazita multlingva edukado devas esti nia edukpolitiko.

Ĉi-kuntekste, ne havi ununuran "nacion" lingvon estis kaj restas saĝa politiko en tiu ĉi plurlingva lando.

MR: Ĉu la indiĝenaj lingvoj estas protektataj leĝe (almenaŭ teorie)?

GR: La protektoj por la lingvaj rajtoj, aparte de indiĝenoj kaj aliaj lingvaj malplimulto, ekzistas je almenaŭ la jenaj niveloj en Barato:

1) Kiel subskribinto de diversaj kon-

vencioj kaj deklaroj internaciaj, ekz. La Universala Deklaro de Homaj Rajtoj, la Konvencio pri Infan-Rajtoj, kaj la Deklaro pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj.

2) Konstitucie, Artikoloj 29, 30, kaj 350 de la barata konstitucio liveras diversajn gradojn de protekto al lingvaj malplimulto en Barato.

3) Konferenco de guberniestroj en 1961 konkludis kun jenaj rekomendoj:

- a) Barataj civitanoj kiuj posedas apartan lingvon, skribon aŭ kulturon, havas la rajton konservi ilin;
 - b) Ĉiu civitano havas la rajton peticii la Ŝtaton en sia propra lingvo, kaj la rajton ricevi respondon de la Ŝtato en la sama lingvo.
 - c) Deklaro de minoritata lingvo kiel "la dua oficiala lingvo" en distriktoj kie pli ol 60% parolas la minoritatan lingvon.
 - d) Tradukado kaj eldonado de ĉiuj gravaj reguloj kaj anoncoj en ĉiujn lingvojn kiuj estas parolataj de almenaŭ 15% de la popolo je subgubernia aŭ distrikta nivelo.
 - e) Neinsisto en ŝtataj laborpostenoj, ke homoj, kiam ili estas dungitaj, scipovu la regionan lingvon; ili povas akiri ĝin poste.
 - f) Ĉiuj minoritatoj, ĉu religiaj ĉu lingvaj, havas la rajton laŭplaĉe starigi kaj administri edukajn institutojn. Kaj laste,
 - g) Elementa edukado per la gepatra lingvo, kiu kompreneble implicas la havigadon de instruistoj kaj lernomaterialoj⁷. (Rao 2010: 163)
- Klaras, ke tiuj ĉi estus fortaj protektoj se ili estus realigitaj.

4) Edukpolitiko en Odiŝo. Post 20 jaroj da agado, en 2014 aktivuloj pri lingvaj edukrajtoj sukcesis persvadi la registaron en la orienta gubernio de Odiŝo verki kaj ekrealigi edukpolitikojn por indiĝena edukado. La politiko rekomendas interalie gepatralingvan edukadon dum la unuaj kvin lernejaraj jaroj; enkondukon de la Odiŝa lingvo en la dua jaro, kaj la angla en la tria jaro kiel studobjektoj (ne instrulingvoj); kaj dungadon de instruistoj flujaj en la gepatraj lingvoj de la lernantoj.

Ni ankoraŭ atendas studojn pri la efikeco de tiuj politikoj, kaj la ebleco duplikati ilin en aliaj partoj de la lando⁸.

Indas noti, ke la proponita Nova Eduka Politiko 2016 de la barata registaro plurmaniere rekomendas malfortigon de lingvaj edukaj rajtoj de indiĝenoj.

MR: Kiamanerie malfortigos la lingvajn edukrajtojn la Nova Eduka Politiko 2016?

GR: La 43-paĝa Malnetaĵo de Nova Edukpolitiko (angla mallongigo: DNEP) estas bazita sur 230-paĝa Raporto de Komitato pri la Evoluigo de la Nova Edukpolitiko (angle: CENEP). Ambaŭ dokumentoj subtenas gepatralingvan edukadon. Sed post agnosko, ke infanoj lernas plej bone en siaj gepatraj lingvoj, la dokumentoj faras jenan rekomendon: "Ĉiuj gubernioj kaj uniaj teritorioj, se ili volas, povas provizi edukadon ĝis la kvina klaso en la gepatra, loka aŭ regiona lingvo kiel instrulingvo."⁹ (p. 31)

Anstataŭ devigi la edukistemon provizi gepatralingvan edukadon, la dokumentoj proponas tiujn

(dikliterajn) eblecojn eviti ĉi tiujn respondecinojn. Infanoj de indiĝenoj kaj lingvaj malplimulto do daŭre ricevos negepatralingvan edukadon.

Efektive por la aŭtoroj de la dokumentoj, gepatralingva edukado por indiĝenoj signifas nur la antaŭ-lernejan edukadon! CENEP rekomendas, ke "La gepatra lingvo ricevu prioritaton kiel instrulingvon en la komenca stadio, antaŭ ol la infano eniras la elementan lernejon" (p. 97). Tio estas, inter la aĝoj de 3 ĝis 6, indiĝenaj infanoj ricevu gepatralingvan edukadon. Post tio ekde la unua jaro, la instrulingvo estu la ĉefa regiona lingvo.

En siaj rekomendoj, CENEP ankaŭ notas, ke "Estas la sperto en pluraj gubernioj, ke indiĝenaj infanoj malfacile komprenas la regionan lingvon, kiu estas la instrulingvo. Por superi tiun ĉi malfacilaĵon, kvankam la instrulingvo [oficiale] restu la regiona lingvo, tamen dum la komencaj jaroj, la klasĉambraj konversacioj estu en la lokaj dialektoj" (p. 193).

(Cetere, ambaŭ dokumentoj plurloke aludas malestime al indiĝenaj lingvoj kiel "dialektoj".)

Sume, la Nova Edukpolitiko 2016:

- daŭre malpermesas gepatralingvan edukadon al infanoj de indiĝenoj kaj lingvaj malplimulto;
- certigas malbonan edukadon por tiuj ĉi infanoj; kaj
- antaŭenigas politikon de lingva asimilado.

La indiĝenoj kaj aliaj religiaj kaj lingvaj malplimulto en Barato jam suferas pro historiaj diskriminacioj kaj la premoj de sovaĝa ekonomia tutmondiĝo. La Nova Edukpolitiko 2016 plu malfortigos tiujn ĉi komunumojn.

¹ https://en.wikipedia.org/wiki/Languages_with_official_status_in_India#Eighth_Schedule_to_the_Constitution

² https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_languages_by_number_of_native_speakers_in_India#List_of_languages_by_number_of_native_speakers

³ <https://web.archive.org/web/20131029190612/>

http://censusindia.gov.in/Census_Data_2001/Census_Data_Online/Language/Statement1.htm

⁴ <http://swarajyamag.com/from-the-archives/rajaji-in-1968-hindi-is-at-best-the-language-of-a-large-minority>

⁵ Jhingran, Dhir. 2005. Language Disadvantage: The Learning Challenge in Primary Education.

New Delhi: APH Publishing Corporation. ISBN: 81-7648-848-8

⁶ Ministry of Tribal Affairs, Government of India. n.d. Table T.2.14: State wise Drop Out Rates of ST Students - 2010-11. Section - 2: Status of Education among Scheduled Tribes. <http://tribal.nic.in/WriteReadData/userfiles/file/Section%20Table/Section2Table.pdf>

⁷ Rao, A. Giridhar. 2010. Lingvaj homaj rajtoj en Barato: La breĉo inter politiko kaj praktiko. En La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke & Ulrich Lins. Roterdamo: UEA. p. 162-170.

⁸ Rao, A. Giridhar. 2014. Odisha promotes multilingual education. Bolii, 16 July. <http://bolii.blogspot.in/2014/07/odisha-promotes-multilingual-education.html>

⁹ DNEP. 2016. Some Inputs for Draft National Education Policy 2016. Ministry of Human Resource Development, Government of India. http://mhrd.gov.in/sites/upload_files/mhrd/files/nep/Inputs_Draft_NEP_2016.pdf

Abonu la paperan version de Heroldo de Esperanto
12 numeroj + 12-monata ali ro al la reta versio

Heroldon Triumfigu per 59 eŭroj kaj tri paŝoj

1 Pagu per Transferwise* ĉe bit.ly/AbonoHdE59-Transferwise

2 Sendu vian datumojn al abono@heroldodeesperanto.com

3 Atendu Heroldon por legi. Tute nova, bela kaj sendependa. Vera revolucio!



* Servo disponebla nur por Eŭropo, Britio, Usono, Aŭstralio, Hungario, Barato, Pollando, Svisio, Sudafriko, Korejo, Ĉilio, Svedio, Danio, Novergio, Ganao, Japanio, Ĉeĥio, Bulgario, Meksikio, Kroatio, NovZelando, Rumanio, Kolombio, Malazio, Rusio, Pakistano, Ĉinio, Tajlando, Ukrainio, Turkio, Vjetnamio.

INFORMAS KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

JARTE 2017

Arta Renkonto Transnacia en Esperanto antaŭmetas "J" kiel Junulara. La kultura festivalo sponsorita de la Esperanta Civito estos ĉi-jara aŭspiciata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Tial la individuaj membroj de TEJO ne pagos la programotizon; sed pli grava, pozitiva konsekvenco estos la partopreno de junaj artistoj.

Dum JARTE, 16-21 julio 2017, organizata de KCE en Ĉaŭdefono, okazos du atelieroj: pri artkomedio kaj pri komiksoj.

Javier Oliva, aktoro kaj reĝisoro, kiu kunorganizis internacian artkomedian festivalon en Malago dum 2012, de multaj jaroj dediĉas sin al tiu nobla teatra ĝenro. Li konsilis interalie Giorgion Silferon por la unua artkomedio en Esperanto, *La verda Arlekeno*. Lia ateliero okupiĝos pri la historio, la esenco, la karakteroj kaj la terminologio de Commedia dell'Arte. En la studendaj specimenoj oni aŭdos ofte la kastilian aŭ la italan; kvankam ambaŭ lingvoj por esperantisto estas pli facile kompreneblaj ol la hungara aŭ la ĉina, certe funkcios ankaŭ postinterpretata servo.

Daniele Binaghi kaj Tihomir Lovrić gvidos atelieron pri la naŭa arto. Diskuto pri bildliteraturo, enkonduko al la redaktado kaj desegnado de bildstrioj, projekto RoMEo, ktp estos en la fokuso de la ateliero. Preparante ĝin Lovrić el Kroatio flugis al Angulemo (Francio) por viziti la Internacian Festivalon de la Bildstrio, fine de januaro. Pli frue li gastis ĉe la literatura kafejo de Fajsi Amika Rondo en Budapeŝto, 19 januaro 2017, por prezenti kun la aŭtoro de la teksto, Giorgio Silfer, la enhavon de la desegnata albumo *Esperantio vivas*.



Apenaŭ 20-jara, Giorgio Di Nucci el Molizo (Centra Italio) aspektas jam virtuozo de la fortepiano. Efektive tia li estas, des pli ke li ludas sen la helpo de partituro, nur parkere. Tiamaniere, dum la lasta Internacia Junulara Festivalo li akompanis la aŭskultantojn en muzika promonado tra la jarcentoj, kun alemandoj kaj tokato, fugo kaj sonato; tamen li nur lastaŭtune ekstudis ĉe konservatorio...

Esperanto estas lia kvara lingvo.

Se oni komparas la lingvojn al muzikiloj, verŝajne la itala en lia orelo memorigas fortepianon. Al kiuj instrumentoj li komparas la aliajn tri idiomojn? Tiel li respondis en *HdE* 4:2016: "La latinan mi komparas al violono, instrumento kiun oni povas tute ŝati aŭ tute malŝati. La bona, brita angla sonoras ankaŭ antike, kvazaŭ klavicembalo aŭ orgeno. Esperanto vekas komparon kun Theremin, elektronika muzikilo inventita de violonĉelisto Lev Termen, ludebla sen fizika kontakto kun la muzikilo mem."

Giorgio Di Nucci gastos en JARTE, la 19-an julio 2017, por matineo. Lia muzika promonado tra la jarcentoj okazos en aparte sugestiva salonego, aneksita al unu el la plej interesaj, karakterizaj kaj misteraj konstruoj en la urbo, fakte la plej bela tiuĝenro en la tuta Svislando.

En la menuo de JARTE situos teatroprezentoj, koncertoj, literaturaj kafejoj, filmoj. Interesatoj povas proponis sian prezenton al kce@esperantio.net. Eblas subteni KCE per donaco tra Postfinance, IBAN CH630900000230029218



Unu leciono pri Esperanto

Estis iam usona esperantisto, Don Harlow, kiu kutimis diri: En Esperantujo oni esence povas fari du aferojn: produkti esperantistojn kaj produkti servojn por esperantistoj. En asocio, kiel la niaj, ĉiu elektas sian laborkampojn tute libere. Sekve multaj elektas la plej facilan kampojn, produkti servojn por esperantistoj. Produkti esperantistojn estas malfacile. Oni devas informi kaj poste instrui. La publiko ne volas plu aŭdi niajn informojn. Ili volas lerni la anglan, kaj taksas nin, parolantojn pri Esperanto, stultuloj. Do, la publiko iru al la diablo. Mi okupiĝas pri tiuj, kiuj jam estas esperantistoj.

Bedaŭrinde tio estas ĉiam pli disvastigata sinteno inter ni de mondaj organizaĵoj al lokaj kluboj. Ĝi, tamen, estas erara, laŭ mi kaj eble laŭ kelkaj aliaj.

Emilio Cid ĵus provis relanĉi agadon por Esperanto kiel komuna lingvo en Eŭropaj landoj. La peticio "Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio, nun!" jam havas preskaŭ 12 mil subskribojn, kaj ni volas atingi 20 mil. La tekston de la peticio vi trovos en via lingvo per ligiloj en kelkaj lingvoj. Bonan ŝancon al Emilio kaj al ni ĉiuj!

Al tio reagis Lu Wunsh-Rolshoven, komisiito de la germana Esperanto-asocio pri rilatoj kun la gazetaro. Li reagis per alia ideo: "Eble ni demandu nin, ĉu survoĵigi plian kampanjon, kies celo estos pli facile atingebla, nome "Ebla alvoko al la instruistoj de la mondo: **Unu lerneja leciono pri Esperanto.**"

Ni povas alvoki al la instruistoj de la tuta mondo, ke ili instruojn sian lernan-

tojn dum unu leciono pri Esperanto kaj ĝia hodiaŭa stato.

Tia alvoko povos esti en multaj lingvoj; komence almenaŭ en tiuj, en kiuj la broŝuro jam ekzistas (angla, franca, germana, Esperanto) – http://bit.ly/lu_ideo.

Ĉiu instruisto, kiu fakte faros tion, estos sukceso de tia kampanjo! Ĉiuj gepatroj kaj aliaj, kiuj deziras tion, povos subskribi.

Antaŭe ni povos demandi niajn amikojn kaj ĉe niaj landoj demandi al vizitantoj, ĉu ili subtenos tian alvokon. Kaj se vi deziras oficialan apogon: La Strategia Laborplano de UEA komenciĝas ĉi tiel:

"Agadkampo 1: Konsciigo

1.1. Ĝeneralaj celoj

1.1.1. Baza informado. Atingi, ke ĉiu homo kun baza klereco (ekz. ĝis la 7a klaso en lernejo) sciu kernajn faktojn pri Esperanto kaj havu aliron al pli detalaj kaj aktualaj informoj en sia(j) lingvo(j) de kleriĝo.

<http://www.uea.org/strategio/konsciigo>

Jen bela okazo por UEA kaj ĝiaj landaj asocioj komenci realigi sian laborplanon kaj ne manie kaj obsede okupiĝi pri statutaj reformoj. La kvanto da tempo donita en UEA al statutaj reformoj estas la lakmusa testo (universala indikilo), kiu pruvas la gradon de esperantisteco de organizaĵo. Por mi estas eĉ mirinde ke ILEI, la internacia ligo de esperantistaj instruistoj, ne jam saltis sur la ideon por igi ĝin sian ĉefan kampanjon.

Naciismo en Pollando kaj tra la mondo

Lucas Barbosa

"Multaj personoj komprenas amon por sia patrujo, kiel identan kun malamo kontraŭ ĉiuj aliaj. Samideanoj! Ni ĉiuj, pace premante al ni la manojn, estas la plej bona atesto, ke en homaj koroj estas sufiĉe da loko por la tuta homa gento."

(Lidja Zamenhof, parolado dum la 17-a Universala Kongreso – Heroldo de Esperanto n-ro 81, 1925)

Alproksimiĝas la 11-a de novembro*, Tago de Sendependeco de Pollando. Tiutage en 1918, Polujo fortranĉita kaj dividita inter rusoj, prusoj kaj habsburgoj post 123 jaroj reunuiĝis kaj reakiris sian suverenecon. Certe tiu estas tago memoriginda kaj festinda. Onidire tamen junulo arabaspekta laŭ poloj havas bonajn kialojn esti singarda kaj eviti promeni tra la "naskiĝurbo de Esperanto" tiam. Ĉiujare evidentiĝas malamo kaj perforto flanke de la plej flamaj manifestantoj. Por tiu, kiu rigardas el sekura distanco, la tago de sendependeco iĝas ofte komuna malamtago kontraŭ ko-

munistoj, islamanoj kaj GLAT-uloj, interalie. Por montri sian amon al sia patrujo, en pasintaj jaroj kelkaj homoj en Varsovio lanĉis fajraĵojn kaj ŝtonojn kontraŭ la polico, atakis ambasadejojn kaj portis tra la stratoj grandajn flagojn, en kiuj legeblis "Pollando por poloj". Profesoro mia pri tio komentis: "Domaĝe... Mi vere ne komprenas tion, kio okazas nun en mia lando. Certe restu hejme."

Transmare, en mia pli varma sed ne vere malpli komplika Brazilo, naciismo evidentiĝas samforte, sed alimaniere. Pro la vasteco de nia lando, kaj la paca pasinteco, almenaŭ kompare kun tiu de Pollando, la tiel nomataj patriotoj koncentras sian ĝihadon kontraŭ "internaj minacoj" Vestitaj verdflave tiuj, kiuj iris al stratoj de niaj plej grandaj urboj peti la forigon de la prezidantino kaj eviti, ke "la flago nia iĝu ruĝa", kaptis la okazon por defendi ankaŭ la "tradician familion" kaj tion, kion ili nomas "meritokratio". Laŭ ili estas neakceptebla, ke la registaro monate helpu al la plej

povraj familioj per mono, sufiĉe por ke ili ne malsatu. Kutime tiuj samaj homoj, pie religiaj, defendas liberigon de armiloj kaj pli striktan lukton kontraŭ drogoj kaj la rajto aborti. Se tiuj kaŭzoj estas defendindaj aŭ ne, decidu vi mem. Interesa por mi estas, ke laŭ multaj homoj, amia patrujo signifas nepre agi tiel.

Kio pri vi, kara samideano, ĉu vi estas naciisto? Kia absurda demando, ĉu ne? Kompreneble vi ne taksas vin tiel, ĉar vi parolas la internacian lingvon, kiu promesas detruji la murojn de miljaroj! Tamen jes, vi estas naciisto, same kiel mi. Certe vi ŝatas la muzikon, kinon kaj manĝaĵojn alilandajn. Eble vi ofte vojaĝas tra la mondo, parolas diversajn lingvojn, kaj ĉiujare ĉeestas la UK-on. Ankoraŭ mi kredas, ke vi estas naciisto!

Sed kio estas naciismo? Laŭ la vortaro de Oxford, "formo de patriotismo, distingebla per kredo de supereco rilate al alia nacioj" Kiel okazas pri ĉiuj ideologioj, ĝi iĝas danĝero kiam fariĝas vere ekstrema, kaj tiu kredo plenumiĝas je la kosto

de aliaj homoj, eksternaciaj, laŭ tiu kredo ne tiom valoraj. Sed vortigi ĝin ne estas tiom simpla tasko, ĉar male al socialismo, kapitalismo kaj ĉiuj aliaj ideologioj, naciismo ne havas klaran doktrinon. Naciistoj ne okazigas kolokvojn, kongresojn aŭ Internacion; ĝi ne disponigas respondojn al fundamentaj demandoj pri la vivo en komunumo. Ideologie naciismo funkcias kiel ĵokero. Ĝi ne enhavas ideologian korpon, sed povas nutri kaj subteni aliajn ideologiojn. Malgraŭ la manko de teorio, ĝi kapablas inspiri emocian kaj sindoneman agadon, malpli simile al aliaj ideologioj ol al religioj. Eventuale ĝi povus esti uzata de iu ajn politika movado. Laŭ Abdul'Bahá, grava predikanto de Bahaismo, naciismo estas frukto de ofta konfuzo inter herooj kaj murdistoj. La naciaj herooj estas fakte eminentaj murdistoj kaj krimuloj. Alivorte, nacia identeco estas subkonscia formo organizi socion surbaze de la "leĝo de la ĝangalo".

Fundamente, naciismo estas la ideo, ke la homaro estas nature,

ekde ĉiam, kaj por ĉiam dividita je nacioj, esence malsamaj. Ni ĉiuj pripensas la mondon laŭ nia mensa mondmapo, altrudita al ni de niaj instruistoj kaj gepatroj. Internaciaj institucioj kiel UN traktas landojn kiel individuojn, kaj kutime ĉe la tavolo ni parolas ŝerce pri "la rusoj", "la ĉinoj", "la francoj", kvazaŭ ĉiuj homoj vivantaj inter la samaj landlimoj havus ekzakte la samajn trajtojn, bone konatajn de ni ĉiuj. Tiu sento aparteni al iu nacio estas ofte nekonscia.

Kaj kio estas nacio, fakte? Kiu inventis ĝin, kaj kiam? Kiom malsamas unu el miaj milionoj da samlandanoj, kiun mi neniam alparolos vizaĝ-al-vizaĝe, kaj araba rifugiinto? Kial la unua havas pli da rajto vivi tie aŭ ie ajn? Tio estas simple nenatura, sed ŝajnas neeble imagi mondon post-nacian! Eĉ movadoj super- aŭ trans-naciaj celas iĝi rekonataj kiel landoj. Certe multon ankoraŭ ni devas atendi antaŭ ni vivos ne kiel "poloj kun rusoj", sed homoj kun homoj, ne nur en Bulonjo. Por prediki pri homanarismo ni unue devas fariĝi homanaristoj.


*Verkita en la pasinta jaro, antaŭ la 11-a de novembro

APRENDA ESPERANTO

Quem aprende Esperanto transforma o mundo

A língua internacional Esperanto está hoje vivendo um momento de grande expansão. A cada dia, sabemos de uma nova notícia boa relacionado com o avanço do Esperanto no mundo. E agora, em primeira mão, o *Heroldo de Esperanto* dá a última notícia: na cidade de Trindade, em Goiás, está se formando uma comissão para fundar uma ONG de âmbito internacional, cujos objetivos serão:

- ▶ Funcionar como uma incubadora de ONGs de âmbito mundial, que adotem o Esperanto como língua internacional de trabalho com atuação nas mais diversas frentes do Terceiro Setor;
- ▶ Criar em Trindade uma escola comunitária de línguas, ponto de partida de uma rede internacional;
- ▶ Atuar em defesa dos direitos linguísticos e das línguas minoritárias.



Se você já sabe Esperanto ou ainda vai aprender, junte-se a nós, onde você estiver. Trindade será a sede da organização, mas a rede a ser formar será mundial. Tudo começa com você.

Aprenda
Esperanto e
transforme
o mundo

Primeiros passos:
<https://lernu.net/pt>

Reuniões regulares da comissão fundadora. Informe-se e engaje-se:
social@lexussocial.com.br

Rua Dona Olívia Maria, Quadra 8, Lote 4, Setor Morada do Bosque - Trindade